

Wim Jansen

Naturaj vortordoj  
en Esperanto

UEA



# Naturaj vortordoj en Esperanto

Wim Jansen

Universala Esperanto-Asocio  
Rotterdam 2008

ISBN 978-92-9017-103-4

© Universala Esperanto-Asocio 2008  
Kompostita en la Centra Oficejo de UEA  
Kovrilo de Francisco L. Veuthey  
Presita ĉe Grafokom, Kroatio

## Antaŭparolo

Tiu ĉi verketo estas resumo el selektitaj temoj, traktitaj en mia nederlandlingva studo *Woordvolgorde in het Esperanto* pri la vortordo en Esperanto (Jansen 2007). Ĝi celas ĉiujn esperantistojn, kiuj interesiĝas pri la gramatiko kaj la funkciado de nia lingvo, kaj volas esti helpilo por instruistoj, kursestroj kaj verkistoj de lernolibroj.

La vortordon, kiel parton de la sintakso, iel tuŝas multaj lernolibroj de Esperanto. Ĝin traktas, jen pli jen malpli detale, niaj didaktikaj gramatikoj kaj ankaŭ la ekstermovada Gledhill (2000). Kio, do, estas nova en la esploroj, kiujn mi resumas ĉi-verke? Mi dirus, ke temas pri la kombino de tri elementoj. Unue, la studo koncernas la nuntempan lingvouzon. La zamenhofa lingvaĵo, tre kerna ekz. en PAG kaj PMEG, ĉi tie restas pure referenca kiel unu el la subkuŝantaj stirfaktoroj, kiuj influas la nuntempan lingvouzon.\* Due, ĝi celas trovi bazon por konfirmi aŭ malkonfirmi la aŭtonomecon de la vortorda sistemo en Esperanto, uzante skribajn kaj parolajn fontojn de diversaj originoj. Trie, per celkonforma aranĝo de eksperimenta laboro ĝi provas ne nur dokumenti, sed antaŭ ĉio kompreni kaj klarigi la vortordajn elektojn, kiujn faras uzanto de Esperanto. Klarigojn la esploro serĉis ne en iu postulata korekteco de la zamenhofa lingvouzo, sed en la obeo aŭ malobeo de certaj universalajoj de la homa lingvo, alivorte en iu ‘natureco’, kies konvinkoforto – jam pro la nuda fakto, ke ĝi estas senpartia – superas ne nur tiun de niaj lernolibroj, sed ankaŭ tiun de nia unua instruisto, L.L. Zamenhof.

Mi proponas mian studon al la esperantistaro kun la urĝa invito, ke oni ne konsideru miajn trovaĵojn betonaj absolutaĵoj. La tendencoj, kiujn mi observis kaj mezuris, kiel ajn klaraj aŭ unusencaj ili jen kaj jen montriĝas, restas tendencoj, el kiuj mi maksimume permesas al mi formuli kelkajn konsilojn por sobra kaj senmita trakto de nia sintakso. La korpusa esploro, kiun mi komencis, meritis pliampleksigon, la esplortemoj profundigon kaj ilia nombro plivastigon. Krome, ĉiu empiria sciencisto scias, ke *unu eksperimento validas kiom neniu eksperimento*. Kvankam, en la kadro de mia esploro, mi sukcesis aranĝi tri seriojn de enketoj, el la vidpunkto de internacieco ili formas nur unu kompletajon, kaj aldonaj ‘esploroj sur la kampo’, kun partoprenantoj el aliaj lingvofamilioj ol la hindeŭropa estas urĝe necesaj.

Por faciligi la legadon, mi lokis preskaŭ ĉiujn notojn en la finon de la verko, lasante piede de la koncerna paĝo nur kelkajn notojn, vere necesajn por la bona kompreno de la enhavo. Tiu, kiu hejmas en la terminologio aŭ ne tuj interesiĝas pri certaj ellaboroj aŭ referencoj, povas senĝene tralegi la tuton

\* Mejloŝtonaj verkoj en la Esperanta literaturo estas referencitaj per siaj konataj mallongigoj. Vidu la bibliografion sur la paĝoj 37-38.

de la komenco ĝis la fino, saltante trans ĉiujn numeritajn notojn. Sendepende de la notoj, la glosaro en la fino servas por klarigi al la leganto kelkajn malpli komunajn lingvistikajn difinojn.

Mi dankas Adriaan den Haan kaj Atilio Orellana Rojas pro ilia zorga tralegado de la manuskripto kaj pro la utilaj sugestoj, kiujn ili proponis. Restas mia, kompreneble, la respondeco pri la enplekto de iliaj komentoj kaj, cetere, pri la tuta finredaktaĵo, inkluzive de eventualaj eraroj, kiujn mi preteratentis. Mi esperas, ke la legantaro tiros profiton el la materialo, kiun mi kolektis kaj prezentas en tiu ĉi vesto.

Wim Jansen,  
en marto 2008.

## **Enhavtabelo**

1	Enkonduko	7
2	Esperanto kiel objektlingvo	11
3	La fona esploro	13
4	La korpuso kaj la eksperimento	18
4.1	La korpuso kompare kun UL/FdE kaj la lerniloj	19
4.1.1	La baza vortordo	19
4.1.2	La negacio	22
4.1.3	La substantiva vortgrupo	25
4.1.4	Manieraj kaj gradaj adjektoj	26
4.1.5	Du objektoj	28
4.2	La kompletiga eksperimento: konkludoj	29
5	Veroj kaj duonveroj pri la vortordo en Esperanto	35
	Bibliografio	37
	Glosaro	38
	Tekstnotoj	39

## Mallongigoj kaj simboloj\*

A	Adjektivo
Adv	Adverbo
C	Komento
F	Fokuso
FG	Funkcia Gramatiko
IO	Nerekta objekto
LR	De live dekstren
N	Nomo, substantivo
Neg	Negacio, neo
Nom	Plennoma
O	Rekta objekto
Pron	Pronomo, pronoma
S	Subjekto
T	Topiko
V	Verbo, verba predikato
X,Y,Z	Arbitra elemento en frazo aŭ vortgrupo

ekz.	Ekzemple
kp.	Komparu
k.s.	Kaj similaj, kaj simile
k.t.p.	Kaj tiel plu
t.e.	Tio estas
t.n.	Tiel nomata
vd.	Vidu

*	1. Neatestita formo; 2. Negramatika formo; 3. Piednoto.
≠	Ne egalas al
>	1. Staras antaŭ; 2. Kondukas al, produktas
<	1. Staras post; 2. Devenas de
‘X’	1. Tiel nomata X; 2. Difino de X
x	Citaĵoj kaj emfazaj elementoj estas <i>kursive</i> presitaj
xyz	Emfazaj elementoj ene de (kursivaj) citaĵoj estas, krome, <b>grase</b> presitaj

\* Mi uzas siglojn, kiuj devenas de la normdona kaj ĉefe anglalingva literaturo sur tiu ĉi kampo kaj kiuj grandparte koincidas kun mallongigoj de la koncerna Esperanta nocio.



## 1 Enkonduko

Ĉi-suba analizo estas bazita sur la teorio de la Funkcia Gramatiko (FG), ellaborita ekde la okdekaj jaroj de Simon Dik kaj aliaj lingvistoj.<sup>1</sup> FG konceptas la homan lingvon kiel instrumenton de socia interagado, kiun homoj uzas kun la intenco establi komunikajn rilatojn inter si. Kontraste al la elirpunkto de la t.n. genera gramatiko, FG konsideras la sintakson ne aŭtonoma, sed subordita al la semantiko kaj finfine al la pragmatiko. La sintakso, al kiu ni ofte revenos sur tiuj ĉi paĝoj, estas helpilo, per kiu la lingvouzanto redonas siajn kompleksajn ideojn en la formo de kompleksaj lingvaj esprimoj. Unu tian eldiritan lingvan esprimon kun (laŭvorta) signifo kaj (aludita) senco oni nomas en FG la ‘parol-ago’. Ĉar ĝi estas tio, kion la parolanto konkrete diras, mi uzos por ĝi la terminon ‘diraĵo’. Ĝian skriban reprezentadon mi nomas ‘frazo’, kiu povas esti simpla aŭ kompleksa. En tiu ĉi lasta kazo la frazo konsistas el ‘ĉeffrazo’, kiu povas memstare okazi, kaj subordita(j) frazo(j) aŭ pli mallonge ‘subfrazo(j)’, kiuj okazas nur en dependo de iu ĉeffrazo.<sup>2</sup>

Sub la nivelo de la konkreta diraĵo FG konsideras plurajn abstraktajn tavolojn kun kreskanta enhava kaj forma organiziteco de la bazo supren. Ili komenciĝas ĉe la plej baza predikataĵo (kunaĵo de predikato kun unu aŭ pli da nemankodevaj frazpartoj, nomataj ‘argumentoj’, ekz. la subjekto kaj la objekto) kaj finiĝas ĉe la propozicio. Tiu ĉi plej alta abstrakta tavolo sub la diraĵo posedas ĉiujn necesajn semantikajn (signifajn) kaj pragmatikajn (sencajn) informojn, por ke la lingvouzanto povu krei sian konkretan diraĵon, provizante la propozicion per la konvenaj formo, vicordo de ĝiaj partoj, prononco kaj intonacia konturo.

En tiu ĉi studo mi difinas la vortordon kiel la koscian ordigon de vortoj kaj vortgrupoj en pli ampleksajn signifo- kaj sencoplenajn ŝablonojn de la diraĵo.<sup>3</sup> La vortordo estas aspekto de la homa lingvo, kiu estis kaj estas esplorata en multaj etnaj lingvoj. En la ĝenerala lingvistiko ĉefrolas demandoj pri la influo de certaj sintaksaj, semantikaj kaj pragmatikaj funkcioj sur la vortordon, kiun parolanto fine elektas en sia diraĵo. Ni rigardu ilin ĉi-sube.

La ‘subjekto’ S estas tiu sintaksa funkcio, el kies vidpunkto aŭ laŭ kies perspektivo priskribiĝas la okazaĵo aŭ la ago en la frazo. En la aktiva frazo *Mi verkas libron* la ago *verki* estas priskribita el la vidpunkto de *mi*; kontraŭe, en la pasiva frazo *La libro estas verkata de mi* la ago estas priskribita laŭ la elirpunkto *la libro*. La aktiva kaj la pasiva frazoj klare montras la eblecon de nekoincido de la sintaksa (perspektiva) kaj la semantika (signifa) funkcioj: en ambaŭ frazoj *la libro(n)* estas la priagato (kaj ne la aganto), sed tiu unusola semantika funkcio korespondas kun du diversaj sintaksaj funkcioj, nome la objekto en la unua frazo kaj la subjekto en la dua. En multaj lingvoj la subjekto elstaras pro sia relativa manko de fleksiaj finaĵoj, kiun ĝi kompensas,

postulante akordon de la konjugita verbo aŭ ĉefverbo kun siaj nombro kaj/aŭ persono. En Esperanto tia akordo ne ekzistas: tiel en *Mi verkas*, kiel en *Li verkas*, kiel en *Ili verkas*, la verba finaĵo *-as* estas sendependa de la singularo aŭ pluralo kaj de la persono, kiu skribas. Ekzistas lingvoj, en kiuj la subjekta funkcio nepre devas esti esprimata, eĉ se ĝi estas sensignifa (kp. en la angla *It rains: \*Ĝi pluvas*). En multegaj lingvoj la subjekto, ĉu pro iu semantika aŭ pragmatika koincido (vd. poste), ĉu propre sintakse, okupas fiksitan antaŭverban lokon en la frazo, tiel en aktivaj kiel en pasivaj frazoj. Sufiĉas tralegi la ĝis nun verkitajn frazojn en tiu ĉi ĉapitro por konkludi, ke ankaŭ nia lingvo montras tiun tendencon.

La ‘objekto’ estas tiu sintaksa funkcio, kiu difinas la sekundaran perspektivon de la ago. En FG oni ne distingas inter la rekta objekto O, kies semantika kunulo estas la suferanto aŭ la rekta celo de la ago, kaj la nereka objekto IO, kiu semantike estas la ricevanto, la favorato aŭ avantaĝato de la ago. En tiu ĉi verko mi tamen preferas konservi la distingon, tiel fundamentan en multaj gramatikoj. Kiel por S, tiel ankaŭ por O kaj IO multaj lingvoj rezervas iun preferatan lokon en la frazo, plej ofte post la verbo. Ankaŭ en Esperanto la frazo *Mi sendis la manuskripton al la presisto*, kun antaŭverba S kaj postverbaj O kaj IO, aspektas unuavide pli natura ol ekz. *Al la presisto sendis la manuskripton mi*. Iuj aliaj sinsekvoj de S, O kaj IO ŝajnas akcepteblaj, sed esprimantaj iun nuancon trans la signifo de la nuda konstato.

Supre mi aludis al eventuala koincido de la subjekto kun iu semantika funkcio. Temas ĉi tie pri la aganto, kiu plenumas la agon priskribitan en la frazo. En la ekzemplo *Mi sendis la manuskripton al la presisto*, la aganto estas *mi*. La rekta celo de la ago, *la manuskripton*, estas semantike la suferanto kaj *al la presisto* indikas la ricevanton. En multaj lingvoj ĉiuj tiuj semantikaj funkcioj inklina al relative fiksitaj pozicioj inter si kaj rilate al la verbo. Aliaj semantikaj faktoroj, influantaj la ordon en la frazo, povas koncerni ekzemple la difinitecon aŭ nedifinitecon de iu frazparto (*la reĝo* kontraŭ *reĝo*), ĝian homecon aŭ nehomecon (*soforo* kontraŭ *kato*), ĝian vivantecon aŭ senvivecon (*leono* kontraŭ *roko*), ĝian pozitivecon aŭ negativecon (*dolĉa* kontraŭ *amara*), k.s. En multaj lingvoj io pozitiva ĉiam antaŭas ion negativan en kunordigo de la tipo *A kaj B*. Ĉu ankaŭ en Esperanto? Ekzistas teorio pri la preferata vicigo de frazpartoj laŭ la skalo ‘homa aganto > nehoma vivanta aganto > senviva aganto > ricevanto > pli viva suferanto > malpli viva suferanto’, en kiu ‘A > B’ signifas, ke A esprimiĝas antaŭ B. La strangaspektaj nocioj ‘pli viva’ kaj ‘malpli viva’ iel reprezentas la skalon, kiu iras de la homo tra bestoj kaj plantoj al senvivaj objektoj, tute subjektive laŭ la impresoj de la lingvouzanto. Ĉu la zamenhofa (*La ŝipeto iris al la fundo*) kun siaj **homoj kaj musoj** estas, do, nura traduko de la germana *mit Mann und Maus* aŭ ĉu temas ankaŭ pri semantika universalajo, kiu spontane reaperas en Esperanto?

Parolante pri pragmatikaj aspektoj de vortordo, ni atentis, aldone al la laŭvorta signifo de lingva esprimo, ĝian senco aŭ la mesaĝon, kiun ni volas transdoni per nia diraĵo. Kiam je la fino de varma somera tago mi eniras klasĉambron kaj retorike demandas *Ĉu ne estas varme ĉi tie?*, mi ne deziras, ke iu legu la termometron por respondi per la objektivaj mezuritaj gradoj, sed ke iu bonvolu malfermi fenestron. Depende de la senco de la diraĵo oni povas uzi la samajn vortojn, kiujn oni uzas en tute neŭtra, eksterkunteksta situacio, sed en alia vicordo. Por reveni al nia ekzempla frazo: se mi volas emfazi, ke *Ne mi, sed iu alia sendis ...*, aŭ ke *Mi sendis ne la manuskripton, sed la presprovojn ...*, aŭ ke *Mi sendis ĉion ne al la presisto, sed al la eldonisto*, etnaj lingvoj prezentas diversajn eblojn, interalie inversigojn de la vortordo. Kiujn instrumentojn disponas kaj preferas la Esperanto-parolantoj por enfokusigi tiajn kontrastojn? Kaj se nia ekzempla frazo estas ero en konversacia ĉeno, kies topiko estas ĝuste la manuskripto, etnaj lingvoj povas uzi diversajn teknikojn por reflekti tiun topikecon, inter kiuj denove aperas inversigoj. Refoje stariĝas la demando pri kiel la Esperanto-parolantoj traktas tiun bezonon.

La ĝenerala lingvistiko studas ankaŭ la interagon inter la vortordo kaj la (morfolgia) fleksio. Kvankam estas tro drasta la aserto, ke lingvo kun riĉa fleksio povas permesi al si liberan vortordon kaj ke, inverse, senfleksia lingvo tute dependas de vortordaj teknikoj por esprimi la signifon de diraĵo, sendube ekzistas iu inversa korelacio inter la morfologia komplekseco de lingvo kaj la graveco de ĝia sintakso. En Esperanto tiu temo koncernas unuavice la rolon de la akuzativa finaĵo *-n* por la ekkono de la rekta objekto O. Ĉu en *La manuskripton mi sendis al la presisto* ni ekkonas *la manuskripton* kiel la objekton nur dank' al ĝia finaĵo *-n* kaj ĉu cetere la frazo esprimas la saman senco kiel *Mi sendis la manuskripton al la presisto* – aŭ ĉu la afero povus esti pli komplika?

Fine, la vortordo estas ĝenerallingvistika temo en studoj pri ĝia interrilato kun la intonacio, ekzemple por esprimi la (kontrastan aŭ emfazan) fokuson. En Esperanto tiu ĉi esplortereno estas vera novalo. Ekzistas laŭ mia scio neniu scienca studo, kiu esploris la internacian akceptebilon aŭ sistemecon en Esperanto de tonaltigoj cele al la enfokusigo de iu fraza parto, kiel la altigo de *i* en *mi*, por esprimi la nuancon, ke neniu alia ol mi mem sendis la manuskripton al la presisto, tiu de *e* en *sendis* por kontrastigi la sendon kun ekzemple permana transdono de la manuskripto aŭ, pli draste (ĉar ĝi celus gramatikan morfemon kaj kontraŭis la akcentregulon), tiu de *i* en *sendis*, ekz. por kontraŭbati peton pri estonta sendo. Eĉ mankas baza intonacia modelo de Esperanto (supozante, ke la esperantistaro universale rekonus tian modelon) kaj des pli mankas indikoj pri la uzeblo de intonaciaj teknikoj anstataŭ sintaksaj aŭ morfologiaj por esprimi pragmatikajn funkciojn.

La kompara lingvistiko resumas ĉion, kion mi tuŝis supre, kaj multon pli, komparante kaj kontrastigante la abundon da etnaj lingvoj kun la celo trovi komunaĵojn, kiuj helpas en la klasado de ‘familioj’ de lingvoj kun komuna deveno, kaj en la malkovrado de ĉiulingve reapertaj trajtoj, sendepende de ilia deveno. Ĉi lastaj estas nomataj universalajoj, ĉar ili malkaŝas al ni certajn universalajn propraĵojn de la homa lingvo. Kelkaj el tiuj universalajoj estas absolutaj, kiel *Ĉiu lingvo posedas vokalojn* (facile konstatebla ankaŭ en Esperanto), aliaj estas kondiĉaj, kiel *Se lingvo posedas sistemon de fleksio, ĝi posedas ankaŭ sistemon de derivado*. Ankaŭ tiu ĉi lasta validas en Esperanto: apud la (gramatika) fleksio per *-j, -n, -as*, k.s. ja staras la (leksika) sistemo de kunmetado kaj derivado per *mal-, bo-, -et*, k.t.p. Ekzistas senesceptaj universalajoj kaj ankaŭ ‘tendencoj’, tiel disvastaj, ke oni atribuas al ili kvazaŭ-universalan validecon.

La influo de la struktura komplekseco aŭ ‘pezo’ de iu frazparto sur ĝia movebleco tra la frazo estas universalajo, relative sendependa de la gramatika statuso de la koncerna parto. Parolante pri la modifantoj de substantivo, ni konstatas en lingvoj kiel Esperanto grandan postsubstantivan stabilecon de la ofte kompleksaj genitivo kaj relativaj subfrazoj.<sup>4</sup> Komparu en Esperanto: *la pordo de la domo* kaj *la pordo, kiu estas fermita* kun postmetitaj genitivo kaj relativa subfrazo. En tiuj samaj lingvoj ni konstatas grandan antaŭsubstantivan stabilecon de la ofte simplaj demonstrativoj kaj numeraloj. Komparu en Esperanto: *tiu pordo* kaj *du pordoj* kun antaŭmetitaj demonstrativo kaj numeralo. La adjektivo ŝvebas ie en la mezo, kaj ankaŭ tion bele ilustras Esperanto: *ligna pordo* kaj *pordo ligna* ambaŭ eblas. Ekzistas lingvoj kun plennomaj objektoj O kaj IO postverbaj, kiuj necese moviĝas antaŭen, kiam ili estas pronomaj.<sup>5</sup> En Esperanto oni povus ilustru tiun moviĝon per *Mi fermas la pordon* kontraste al *Mi ĝin fermas*, sed en nia lingvo la relokiĝo de la objekto ne estas devo, sed opcio.

Principe estas neniu garantio, ke Esperanto montras kompletan internan koheron inter la universalajoj, kiujn ĝi iel ensorbis: la lingvo ja komenciĝis kiel persona kreaĵo, en kiu la jama ĉeesto de arbitraj aŭ sinkontraŭdiroj ne estis necese ekskludita. La fakto, ke la lingvoprojekto de 1887, laŭ la konvinko de sia parolantaro, evoluis al vivanta lingvo, ne ŝanĝas tiun simplan konstaton. Tiu 120-jara evoluo signifas, ke teorie centoj da miloj da ialingvaj denaskuloj havis la okazon eksporti en Esperanton tiujn universalajojn, kiuj aspektis iel aplikeblaj, sed kiuj povus kolizii kun la universalajoj de alilingvaj denaskuloj aŭ kun jam establitaj preskriboj aŭ reguloj en la lingvo. En lingvoprojekto kun tiel magra gramatiko, kia la Esperanta en la *Unua Libro* (UL), tiu risko estis pli reala ol imagita.

## 2 Esperanto kiel objektlingvo

Ĉu ekzistas bonaj argumentoj por loki la planlingvon Esperanto apud la naturajn lingvojn kiel meritplenan kaj instruan objekton sur la kampo de la esploroj pri la homa lingvo ĝenerale? Mi kredas, ke la ĉi-sube donota prirezonado kontribuos al jesa respondo al tiu demando.

Esperanto estis kreita de unu persono, L.L. Zamenhof, kiu ĝin publikigis en 1887, preskaŭ tridek jarojn antaŭ la publikiĝo de la unua moderna lingvoteorio, la strukturismo.<sup>6</sup> Zamenhof ne estis lingvisto, sed konis dekon da klasikaj kaj modernaj lingvoj. Li kreis Esperanton intuicie kaj empirie, profitante sian relative vastan praktikan lingvokonon kaj ne bazante sin sur iuj specifaj teoriaj elirpunktoj. El tiu kreaĵo fariĝis la planlingvo kun la plej longa seninterrompa historio de uzateco. La nuna Esperanto-lingvokomunumo manifestas sin kiel tutmonde disvastiĝinta parolantaro, kiu uzas la lingvon en tiom da aplikoj, kiom neniu alia planlingvo eĉ de malproksime iam atingis.<sup>7</sup> Tiu ĉi parolantaro nombras multajn individuojn, por kiuj la komuna lingvo Esperanto kontentigas ĉiujn komunikadajn postulojn, kiujn ili povus imagi por t.n. dua lingvo. Nemalofte ili spertas sentimentan ligitecon al la lingvo, kian oni atendus ĉe fieraj parolantoj de iu nacia kulturlingvo, pli ol ĉe parolantoj de planlingvo, kiu ne havas siajn radikojn en iu naciismo aŭ patriotismo. Laŭ la kriterio de deveno kiel distingilo inter la planiteco kaj natureco de lingvo oni povas nomi Esperanton planlingvo spertata kiel natura, kaj tio eblas dank' al la multeco de ĝiaj aplikoj, la natura kaj afekcia traktado de la lingvo far ĝiaj parolantoj kaj ilia kreemo en la lingvo. Ĉi-supra konciza karakterizo de ĝia lingvokomunumo elstarigas Esperanton kiel la solan planlingvon plene socian, elkreskintan el sia projektstadio, kaj ĝi pravigas etikedi la lingvon funkcie natura, kvankam nek ĝia socia radikiĝo, nek ĝia funkcia natureco devas maski la specialan devenon de la lingvo.

La publikigon de la lingvo en 1887 akompanis konciza gramatiko kaj baza vortaro, kiun la uzanto devis pligrandigi memstare. Ekde tiam, kvar kvin generacioj de uzantoj plu evoluigis la lingvon, kiu, dume, ne disfalis en malsamajn variaĵojn. Male, observante la hodiaŭan parolan kaj skriban normaron, oni emus konkludi, ke ĝi evoluis direkte al granda unuformeco. La gramatikaj reguloj, kiuj estis dekomence disponeblaj, ne multe helpis sur tiu vojo. Tiel en la gramatiko de UL kiel en la deviga *Fundamento de Esperanto* de 1905 (FdE) malabundas eksplicitaj preskriboj. Tio validas antaŭ ĉio por la sintakso. Kontraŭe, ĉeestas en relativa abundo tekstoj ekzemplaj. En la unua ampleksa scienca priskribo de Esperanto en la nederlanda lingvo ni legas pri tio (Manders 1947: 334): *Devigaj preskriboj* [WJ: por la konstruo de frazoj], *do, mankas. Tamen, la verkantoj de prozo silente respektas iujn regulojn, kiuj estas interpreteblaj kiel normdonaj.* Manders, tamen, ne profundiĝas en la

temon kaj lia konstato restas nekontentiga, se, pli ol *konstati*, ni volas *klarigi* la ekziston de vortordaj ŝablonoj, kies funkcioj montriĝas rekonataj tra la tutmonda Esperanto-parolantaro. Sekve, pli da esploroj estas necesaj kaj la antaŭe starigita demando pri kial turni nin al Esperanto, aŭ ne deturni nin de ĝi, por fari lingvistikajn esplorojn, estas respondebla jene. Okupiĝi pri Esperanto (t.e., en tiu ĉi studo, pri la Esperanta vortordo) signifas unue pristudi lingvon, kiu estis intuicie kaj empirie konstruita sen eksplicitaj reguloj por la vortordo; ĝi signifas due pristudi la lingvon de komunumo, kiu malhavas iun formalan (ni diru: ŝtatan) aŭtoritaton, kiu estus rajtigita devige preskribi aŭ malpermesi tiun aŭ alian konstruon de frazo (krom se ĝi estus rekte kontraŭfundamenta). Ĝi signifas trie pristudi lingvon kultivatan de multaj siaj uzantoj kiel absolute naturan instrumenton por interkomunikiĝo kaj artisma kreemo, per kiu eblas senĝene esprimi sin, sen ekspone sin al la risko de embarasa korektado fare de denaskuloj. En tiu kunteksto, voĵmontraj parolantoj kaj verkistoj kontribuis al la radikigi de vortordaj ŝablonoj, kiuj ludas rekoneblajn rolojn en la internacia interkomunikiĝo, sed kies detala funkciado restis neesplorita ĝis nun.

### 3 La fona esploro

Estas observebla fakto, ke Esperanto evoluas. Depost sia publikiĝo, kaj de 1905 sur la bazo de sia netuŝebla FdE, la lingvo montras ne nur grandan leksikan riĉiĝon, sed ankaŭ laŭgradajn ŝanĝiĝojn sur aliaj kampoj. *Interlingvistiko kaj Esperantologio* (Manders 1950/1980) estas provo eltrovi la normojn, kiuj difinas tion, kio povus esti nomata korekta Esperanto.<sup>8</sup> Bazante sin sur esploroj antaŭe faritaj por la angla en Jespersen (1946), Manders konstatis la aplikeblon al Esperanto de kvin normoj: la aŭtoritata (ĉefe FdE), la geografia (laŭvorte la ‘okcident-eŭropa, amerika’), la literatura (ĉefe la zamenhofa), la demokratia (tiu de la plimulto, kies lingvouzo estas sekvata) kaj la logika. Per tiu esploro Manders esperis ankaŭ prilumi aspektojn de la evoluo de la lingvo. La rezultoj estis publikigitaj en 1950 kaj kovris, do, la unuajn 63 jarojn de la vivo de la lingvo, rondigite la duonon de la nun priskribebla evoluvojo. Tio en si mem jam pravigas kritikan rerigardon al la donitaĵoj ĉe Manders. Mia ĝisdatigo de la laboro de Manders kaj trastudo de la esperantologia literaturo pri vortordo kondukas al la konstato, ke ekzistas ses-sep aktualaj normoj, kiujn oni povas preni kiel kriteriojn por juĝi, ĉu ies lingvaĵo estas en korekta Esperanto. Reflektante la originalan ordon ĉe Manders, mi listigas ĉi-sube la reellaboritajn normojn:

1. La aŭtoritata normo: FdE. Kiel prestiĝajn subnormojn mi konsideras (N)PIV, PAG kaj, de iom da tempo, PMEG.
2. La geografia normo: la okcidenta lingvouzo.
3. La didaktika normo: didaktikaj gramatikoj, lernolibroj, vortaroj; nerekte ankaŭ beletraĵoj.
4. La plimulto-normo.
5. La klareco-normo.
6. La estetika normo.
7. Universalajoj de la homa lingvo.

Por eviti facilan miskomprenon, mi tuj klarigu la duan normon de Manders, kiun mi ne malakceptis, sed iom modifis. Oni ne povas ne konstati, ke *lingve* Esperanto estas esence eŭropa. Ĝi ne nur naskiĝis el la intelekta tradicio de la 19-jarcenta Eŭropo: ĝia fonologio enhavas soninventaron, kiu estas komuna al multaj eŭropaj lingvoj kaj malhavas fenomenojn, kiuj estas konataj nur aŭ precipe ekster Eŭropo, kiel klakojn aŭ ensilabajn tonvariigojn kun leksika distingopovo; ĝia leksiko estas grandparte de hindeŭropa deveno kaj ene de tiu kvalifiko impone latinida kun ĝermanaj kaj slavaj kontribuoj. Kvante superpezas eŭropaj semantikaj difinoj. La morfologio de Esperanto estas *teknike* simila al ekz. la nehindeŭropa eŭska, sed *forme* ĝi sekvas la

(hind)eŭropecon de la leksiko. La sintakso de la lingvo fidele respiegulas tiun de siaj ĉefe eŭropaj fontlingvoj (kiel ni detale vidos poste). La lingva eŭropeco de Esperanto ne signifas valorjuĝon kaj neniel kolizias kun la fakto, ke *socie* la lingvo estas tutmonda. El la originala difino de Manders mi retenas la parton ‘okcidenta’, sed ellasas la antaŭan ‘eŭropa-amerika’.

Se la supre proponitaj normoj validas por decidi pri la korekteco de ies lingvaĵo kiel tuto, ili implicate validas ankaŭ por la korekteco de la vortordo uzata en tiu lingvaĵo. Kaj se la normoj validas por decidi pri la (sinkrona) korekteco de la vortordo en la nuna stadio de Esperanto, ili povas esti reinterpretataj kiel faktoroj, influantaj kaj influantaj la vortordon diakrone. Mi nomu ilin la ‘stirfaktoroj’ de la vortordo.

Se oni volas ne nur *dokumenti* la traktadon de la vortordo far la nuntempaj esperantistoj, sed ankaŭ *kompreni* ĝin, oni devos, do, pristudi ĝin laŭ la perspektivo de la supre menciitaj stirfaktoroj, aŭ almenaŭ de la plej gravaj el ili. La faktoroj aŭtoritata (1), didaktika (3) kaj tiu, kiu koncernas universalajojn de la homa lingvo (7) estas neĉirkaŭireblaj por ĉiu serioza studanto de la lingvo, kiu lernas sian Esperanton el iu lernilo, kiu enhavas regulojn pri ‘bona Esperanto’ (3). Li aŭ ŝi nepre konfrontiĝas, en iu momento dum sia studado, kun FdE (1) kaj inklinas al transmeto de tiu subensambleo de universalajoj el sia gepatra lingvo, kiuj ŝajnas aplikeblaj ankaŭ al Esperanto (7). Ĉi tiuj estas la primaraj stirfaktoroj. Oni povas supozi, ke ili validas neeviteble por la kolektiva esperantistaro kaj ke ili reflektiĝas en la vortordaj ŝablonoj de la kolektivo.

La aliajn faktorojn en la listo oni povas nomi sekundaraj. Ĉe ili grave rolas la individua inklino aŭ malinklino, sekvi ekz. la okcidentan lingvouzon (2) aŭ la lingvouzon de iu (prestiĝa?) plimulto (4). Influas ankaŭ la individua prefero, gusto aŭ talento por krei klaran tekston (5), paroli belsone aŭ verki facile prononceblan tekston en bona stilo (6). La sekundaraj faktoroj povas esti uzataj en la esploro, kiam la apliko de la primaraj lasas dubon pri la rezulto.

Por meti en la necesan perspektivon la esploron pri kiel la moderna esperantistaro elektas siajn vortordajn ŝablonojn, estis analizitaj antaŭ ĉio la primaraj stirfaktoroj aŭtoritata kaj didaktika. Al la unue menciita grupo apartenas en tiu ĉi studo UL, FdE kaj ĉiuj troveblaj komentoj pri vortordo (ne la lingvaĵo mem) en la *Lingvaj Respondoj* de Zamenhof (LResp). La esploro ne estas (diakrona) esperantologia studo pri la evoluo de certaj vortordaj fenomenoj, sed (sinkrona) ĝenerallingvistika studo pri tiuj fenomenoj en la nuna stato de la objektingvo Esperanto. Tial la elekto de vortordoj far la moderna esperantistaro estas mezurata nur laŭ la plej fruaj aŭtoritataj dokumentoj, t.e. UL/FdE. Ili siavice generis dekojn, se ne centojn, da lerniloj,



kiuj kune muldis la nuntempan lingvouzon. La due menciita grupo konsistas el la fruaj naciaj adaptoj de UL plus 70 lernolibroj publikigitaj inter 1902 kaj 2001 en entute dek instrulingvoj, plus la tri priskribaj gramatikoj *ABC Gramatiko de Esperanto* (ABC), *Plena Analiza Gramatiko* (PAG), kaj *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG).<sup>9</sup> Tiu ĉi materialo, kiun mi ekde nun kaptos sub la ĝeneralan nomon ‘lerniloj’, liveris la prioritatan ordon de studindaj temoj sur la kampo de vortordaj fenomenoj *laŭ la esperantistoj mem*. De pli grava al malpli grava, tiuj temoj estas:

- La vortordo ĝenerale, ofte rilatigita al la deviga signo de la akuzativo kaj pro tio reduktebla al la vicordo de la frazargumentoj S kaj O rilate al V.
- La loko de la negacia partikulo *ne*.
- La loko de la epiteta adjektivo A rilate al la substantivo N.
- La loko de la maniera aŭ grada adverbo Adv rilate al la verbo V.
- La loko de la rekta objekto O rilate al la nereкта IO.

Parolante pri universalajtoj, mi aludas ne nur al tiuj, kiuj estas retroveblaj sub tiu preciza nomo en la konataj verkoj de Greenberg, Hawkins kaj aliaj, sed al vasta gamo da proprajtoj, absolutaĵoj kaj tendencoj, al kiuj oni ĝenerale atribuas larĝgaskalan aŭ universalan aplikeblon. La testoj, al kiuj mi submetis Esperanton kaj kiuj rekte koncernas tiun ĉi resumon, estas bazitaj sur la sekvanta listo de, parte miksitaj, fenomenoj:

1. Ĉu SO estas retrovebla en Esperanto kiel la preferata ordo de {S,O}?\*  
Ekzemplo: se ni proponas en alfabeto vicordo la tri vortgrupojn *la filon, la patro* kaj *renkontas*, kaj petas esperantiston formi el ili la plej naturan frazon, ĉu ni retrovos preferon por *La patro renkontas la filon* aŭ por iu alia strukturo?
2. Kia estas la relativa forteco de la negacia partikulo kaj de tempaj kaj lokaj adverboj por rompi la ligan en {V,O}?  
Ekzemplo: ĉu, uzante la elementojn *kafon, li, neniam* kaj *trinkas*, ni retrovos la plej fortan malaprobon por la kazo de *Li trinkas neniam kafon* (kontraste, interalie, kun *Li neniam trinkas kafon*)?
3. Ĉu eblas forigi la subjekton kaj/aŭ la objekton el la dua frazo de kunordigita frazparo?  
Ekzemplo: ĉu eblas diri *La patrino verŝis la teon kaj ŝi trinkis* kaj/aŭ *La patrino verŝis la teon kaj trinkis ĝin*?

\* La skribmaniero {X,Y} signifas la neorditan kombinon de X kaj Y, kun du eblaj permutoj: XY kaj YX; {X,Y,Z} estas la neordita kombino de X, Y kaj Z, kiu montras ses eblajn permutojn: XYZ, XZY, YXZ, YZX, ZXY kaj ZYX.

4. Ĉu el la supozata baza ordo SO la inversigeblo al OS montras iun korelacion kun iuj diferencoj en vivanteco inter S kaj O?<sup>10</sup>  
Ekzemplo: ĉu oni pli volonte uzas la strukturon *La fiŝiston renkontas la ŝipestro* ol *La ventegon renkontas la ŝipestro*?
5. Ĉu el la supozata baza ordo SO la inversigeblo al OS estas klarigebla el la topikigo de O kaj, se jes, ĉu ĝi montras iun korelacion kun la (ne)difiniteco de O?  
Ekzemplo kun difinita objekto: ĉu, parolinte pri iu vortaro, naskiĝas iu prefero por daŭrigi per *Ĝin mendis jam multaj personoj* anstataŭ per *Multaj personoj jam mendis ĝin*?
6. Ĉu ekzistas iu korelacio inter la elekto por IO-O anstataŭ O-IO kaj iuj diferencoj en la vivanteco de O kaj IO?  
Ekzemplo: ĉu ekzistas malsamaj preferoj en la konstruado de frazo por doni  *piedbaton* (senviva objekto)  *al knabo* (vivanta nereкта objekto) aŭ  *al pordo* (senviva nereкта objekto)? Ĉu ekzistas malsamaj preferoj en la konstruado de frazo por vendi  *sklavinon* (vivanta objekto)  *al reĝo* (vivanta nereкта objekto) aŭ  *al vendejo* (senviva nereкта objekto)?
7. Ĉu ekzistas iu korelacio inter la elekto por IO-O anstataŭ O-IO kaj iuj diferencoj en la topikeco de O kaj IO?  
Ekzemplo: ĉu, depende de la konversacia temo, kiu povas esti Johano aŭ bela libro, la preferata frazkonstruo estas  *Mi donacos al Johano ekzempleron* aŭ  *Mi donacos ekzempleron al Johano*?
8. Ĉu enfokusigita frazparto okupas iun preferatan pozicion en la frazo, ekz. frazkomencan, frazfinan aŭ antaŭverban?  
Ekzemplo: se estas insista peto pri senprokrasta finredaktado de iu raporto, ĉu oni preferas diri  *Rapide mi finos mian raporton* aŭ  *Mi finos mian raporton rapide* aŭ  *Mi rapide finos mian raporton*?
9. Ĉu fokusaj frazpartoj estas relokeblaj antaŭen, nur se ili estas difinitaj aŭ prefere difinitaj?  
Ekzemplo: se oni demandas, kiun vi vidis, kaj tiu vidita persono estas la novulo en la konversacio, ĉu oni same facile diras  *La reĝon mi vidis* kiel  *Reĝon mi vidis*?
10. Ĉu la fendotekniko estas uzebla por enfokusigi iun frazparton kaj, se jes, kia ĝi aspektas detale?<sup>11</sup>  
Ekzemplo: se vi nepre volas ricevi specifan pomon el propono de pomoj kaj piroj, ĉu vi dirus  *Estas tiu pomo, kiun mi volas*?
11. Ĉu la pasivigo de la frazo estas uzebla por antaŭenigi la topikon kaj, se jes, ĉu ĝi montras iun korelacion kun la (ne)difiniteco de la origina O, kiu fariĝas S?  
Ekzemplo (reprenita laŭ 5): ĉu alternative oni inklinas daŭrigi per  *Ĝi jam estas mendita de multaj personoj*?

12. Ĉu en kunordigoj de la tipo *A kaj B* la elemento A reprezentas la pli altan, la pli grandan, la pli pozitivan, la tutaĵon, kaj B la malpli altan, la malpli grandan, la pli negativan, la parton de tutaĵo?  
Ekzemplo: ĉu prefere *generalo kaj kaporalo* ol inverse, ĉu *libro kaj paĝo* aŭ *paĝo kaj libro*?
13. Ĉu la pezo de iu frazparto kundedidas pri la fine elektota ordo en {S,V,O}, {O,IO}, {A,N} kaj {Adv,V}?<sup>12</sup> Alivorte, se SO montriĝos la baza ordo, ĉu multsilaba subjekto inklinos al pli malantaŭa pozicio laŭ SO > OS, kaj simile en la aliaj kazoj?

La supra listo respegulas fenomenojn sintaksajn (1-3), semantikajn (4-6, 9, 11, 12), pragmatikajn (5, 7-11) kaj strukturajn (13). Tiuj ĉi dek tri demandoj estis ‘tradukitaj’ al 111 celitaj enketeroj, en kiuj la esplorata universalaĵo estis zorge izolita.

## 4 La korpuso kaj la eksperimento

Por dokumenti la modernan lingvouzon en la perspektivo de tio, kion instruas UL/FdE kaj la lerniloj de la lingvo, estis farita kvanta kaj kvalita esploro pri la vortordo en kolekto de freŝdataj, plejparte aferecaj tekstoj, al kiuj mi ekde nun referencos kiel la ‘korpuso’. La korpuso konsistas el lastatempaj jarkolektoj de la revuoj *Esperanto* kaj *Monato* kun suma amplekso de ĉ. 280.000 vortoj. El tiu korpuso, subkorpusoj de maksimume po 150.000 vortoj estis uzitaj por la kvantaj esploroj.<sup>13</sup> En tiu ĉi parto de la esploro la koncernaj fenomenoj estis elsarkitaj per la helpo de ŝlosiloj, kiel la vortfina *o(j)n* por trovi frazojn kun rekta objekto, *ne* por trovi la negacion, la vortfina *a(j)n* por trovi frazojn kun adjektivoj, la vortfina *e* por trovi frazojn kun adverboj kaj la vorto *al* por trovi frazojn kun nereka objekto.<sup>14</sup>

Por provi klarigi kaj kompreni la vortordan sistemon ĉe la esperantistaro, necesas ne nur kompari ĝin kun tio, kion la uzanto transprenis el UL/FdE kaj el lerniloj de la lingvo, sed, kiel antaŭe dirite, ankaŭ kun tio, kion diktas certaj universalajoj de la homa lingvo. Krome, skriba teksto ofte ne klare malkaŝas la pragmatikajn motivojn, kiuj eventuale kondukis al la elekto de la strukturo, kiun la verkinto aplikis. Tial estis kondukita kompletiga eksperimenta esploro, en kiu tri grupoj de Esperanto-parolantoj estis enketitaj pri vortordofenomenoj. Unu grupo, stabanoj de la Centra Oficejo de UEA, konsistis el profesiaj uzantoj de Esperanto kaj estis komplete miksitaj laŭ denasklingvaj fonoj. La dua grupo, enketita en Antverpeno, Flandrio (Belgio), konsistis el denaskaj nederlandlingvanoj. La tria, enketita en Villeneuve d’Ascq apud Lille (Francio), konsistis el denaskaj franclingvanoj. Entute 40 personoj estis enketitaj kaj ĉ. 4000 respondoj estis ellaboritaj.<sup>15</sup> Tiun ĉi parton de la esploro mi nomos ekde nun la ‘eksperimento’. La enketo konsistis ĉefe el taskoj konstrui simplajn frazojn ekster aŭ en iu donita kunteksto, formuli respondajn frazojn al demandoj ekster aŭ en iu donita kunteksto kaj elekti inter iuj prezentataj alternativaj frazkonstruoj por ilustrii iun skizitan eventon. La variabloj estis sintaksaj (ekz. loki la subjekton kaj objekton), semantikaj (ekz. vivanteco kontraŭ senviveco), pragmatikaj (ekz. trakti argumenton kiel fokuson aŭ topikon) kaj strukturaj (la simpleco aŭ komplekseco de iu frazelemento).<sup>16</sup>

La rezultoj de la kvantaj analizoj el la korpuso konverĝis relative rapide al stabilaj niveloj, kiujn mi juĝis reprezentaj por la tuta korpuso. Inter la rezultoj de la eksperimenta esploro kiel tuto kaj tiuj de la korpusa esploro ne estas observeblaj iuj konstatoj, kiuj sin reciproke kontraŭdiras. Fine, inter la rezultoj de la tri unuopaj grupoj de enketitoj konstateblas neniu alia signifa devio de la suma averaĝo ol tiu, kiu estas klarigebla el pli altnivela lingvokonscio ĉe la profesiaj parolantoj kompare kun la neprofesiaj. Resume, la rezultoj de la eksperimento montriĝis tre homogenaj.

## 4.1 La korpuso kompare kun UL/FdE kaj la lerniloj

### 4.1.1 La baza vortordo

Kiel ‘bazan vortordon’ mi difinas la vicordon de plennomaj argumentoj S kaj O rilate al V en aserta, informneŭtra ĉeffrazo. Kiel ekzemplo servu la eksterkunteksta frazo:

(1) *La aŭtoro verkas libron.*

En (1) oni ne demandas, sed pozitive asertas ion pri plennoma subjekto (*aŭtoro*), kiu produktas plennoman objekton (*libron*). La frazo estas sendepende uzebla (ĉeffrazo), enhavas nenion jam preparolitan, emfazas nenium elementon kaj estas tiusence informneŭtra. Se, en nia analizo, ni provizore lasas la kondiĉon pri informneŭtreco flanke, tiam el UL kaj FdE rezultas la sekvanta tabelo I:

	Numero	SVO	OSV	SOV	OVS	VOS	VSO
1. S <sub>Nom</sub> kun O <sub>Nom</sub>	59	52	5		1		1
2. S <sub>Nom</sub> kun O <sub>Pron</sub>	22	11		4	6	1	
3. S <sub>Pron</sub> kun O <sub>Nom</sub>	157	137	18	2			
4. S <sub>Pron</sub> kun O <sub>Pron</sub>	42	29		13			
Sumoj	280	229	23	19	7	1	1

Tabelo I: Argumentordoj en UL/FdE.

Por interpreti la duan linion de la tabelo, la leganto ŝanĝu la ekzemplan frazon (1) al *La aŭtoro verkas ĝin*, en kiu la objekto estas pronomo. Por ilustru la trian linion, vi pensu pri *Li verkas libron*, en kiu la subjekto estas pronomo. Fine, la kvara linio estas ilustrebla per *Li verkas ĝin*, en kiu tiel la subjekto kiel la objekto estas pronomaj.

Tuj unuavide la sumaj nombroj montras grandan statistikan dominadon de SVO, kiu superregas la aliajn teorie eblajn permutojn per  $229/280 = 82\%$ .\* En la (horizontala) linio 1 de tabelo I, SVO ne nur dominas, sed montriĝas ankaŭ la baza vicordo en  $52/59 = 88\%$  el ĉiuj kandidataj frazoj, ĉar la restaj

\* La skribmaniero 229|280 indikas 229 trovojn laŭ iu antaŭe difinita kriterio el sumo de 280 kandidataj aperoj.

7|59 frazoj (distribuitaj inter OSV, OVS kaj VSO) estas klare neneŭtraj el informhava vidpunkto. Se ni malatentas la kondiĉon pri la plennomeco de la subjekto kaj/aŭ la rekta objekto, ni retrovas, sumante la liniojn 2, 3 kaj 4 de la tabelo, ke SVO superregas en  $177|221 = 80\%$  el la kandidataj frazoj. Kiel en linio 1 de la tabelo, tiel ankaŭ en la linioj 2-4, la restaj frazoj (44|221, distribuitaj inter ĉiuj aliaj permutoj) montras vastan neplenumon de la kondiĉo pri informneŭtreco, sed la distribuo de la permutoj aliaj ol SVO estas komplete alitipa en la linioj 2-4 sume, ol en linio 1. La permutoj SOV tute ne aperas en linio 1, sed ĝi estas la dua plej grandnombra en la linioj 2-4. Se ni kalkulas la permutojn aliajn ol SVO en la unuopaj linioj, ni trovas en linio 1:  $7|59 = 12\%$ ; en linio 2:  $11|22 = 50\%$ ; en linio 3:  $20|157 = 13\%$ ; en linio 4:  $13|42 = 31\%$ . La inklino je forlaso de SVO montriĝas maksimuma, kiam la struktura diferenco inter plennoma S kaj pronoma O estas maksimuma (linio 2) kaj montriĝas minimuma, kiam, senkonsidere de la subjekto, la objekto estas plennoma (linioj 1 kaj 3). Sur la bazo de UL/FdE, jenaj konstatoj do trudas sin:

- Laŭ la supre donita strikta difino, la baza vortordo en Esperanto estas SVO.
- Ankaŭ en la kazoj de pronoma(j) argumento(j), SVO dominas la aliajn vicordojn per larĝa superregado.
- Tiel en la kazo de plennomaj, kiel en la kazo de pronomaj argumentoj, la konstruado de la frazo estas influata de pragmatikaj faktoroj (neneŭtreco de la frazo laŭ sia informstrukturo).
- Pronomaj argumentoj (precipe: objektoj) supozigas, ke la konstruado de la frazo estas aldone influata de vortstruktura faktoro (relativa komplekseco, ankaŭ nomata 'pezo'), pro kiu la pronoma objekto estas relokebla antaŭ la verbon.

Inkluzive de la lerniloj la esploro estas resumebla jene:

- SVO estas la 'kutima' vortordo, kiun oni uzu, krom se
  - pragmatikaj cirkonstancoj pravigus forlason de la kutima ŝablono. La lerniloj montras ekzemplojn de livenmetoj kaj dekstrenmetoj de fokusaj frazpartoj kaj ekzemplojn de la frazfendo por enfokusigi iun frazparton. La lerniloj ankaŭ referencas al stilo kaj al retorikaj figuroj, ofte sen ellaboro de tiuj terminoj.
  - vortstrukturaj cirkonstancoj pravigus forlason de la kutima ŝablono. La lerniloj montras ekzemplojn de dekstrenmetoj de kompleksaj frazpartoj kaj de la moviĝemo de malpezaj frazpartoj kiel mallongaj manieraj adjektoj kaj pronomaj objektoj.

- Oni ĉiam atentu la postulon pri klareco de la teksto kaj kungrupigu tiujn frazpartojn, kiuj havas signiforilaton inter si.
- Oni ĉiam atentu la belsonecon de la teksto.

Estas menciinde, ke inter la lerniloj ekzistas unu kategorio de lernolibroj, kiuj difinas la argumentordon komplete libera.<sup>17</sup> Tiu ĉi difino, kiu nemalofte baziĝas sur mikso de la *signifo* kaj la *senco* de diraĵo, povas esti misgvida. Ĝi, tamen, ne respuguliĝas en la lingvouzo de la korpuso. La korpuso montras jenan distribuon de la teorie eblaj permutoj de {S,V,O}:

OSV	OVS	SOV	SVO	VOS	VSO
1,1%	6,9%	0,4%	90,1%	1,2%	0,3%

Tabelo II: Ŝablonoj de {S,V,O} en la korpuso.

Mi nun trairos de live dekstren la minoritatajn permutojn (ne-SVO-tipajn). OSV kaj OVS estas troveblaj kun topika aŭ kun fokusa objekto. Ekzemplo de OSV kun topika objekto, grase presita, estas:

- (2) *Oni malpermesis al Edwin labori en la konservatorio. **Lian nomon** la nazioj enskribis en la libron ...* (El la jarkolekto de *Monato* 2002)<sup>18</sup>

kun la topika objekto *lian nomon*, kiu rekte reprenas la topikon *Edwin* el la antaŭa frazo. Ekzemplo de OSV kun grase presita fokusa objekto estas:

- (3) *Kontraŭis lin plejparte la urba konsilio kaj la paroĥestro, kiu kredis, ke solenaĵo malhonorigos la nacion. Tamen **apogon** Godlewski ricevis de la prezidanto ...* (El la jarkolekto de *Monato* 2002)

en kiu *apogon* emfaze kontrastas kun la ĝenerala kontraŭstaro, kiun la subjekto spertis en la antaŭa frazo. Similaj kazoj estas facile troveblaj por OVS. La vicordo SOV okazas en tre malgranda nombro da frazoj, kiel en

- (4) *Ofte virinoj **helpon** petas por kontraŭi ...*  
(El la jarkolekto de *Monato* 2002)

en kiu ne troveblas alia klarigo por SOV ol la malpezeco de la grase presita dusilaba objekto, kiu faciligus ĝian movon antaŭen, inter S kaj V. La vicordo VOS montriĝas pragmatike kaj strukture motivita. En la sekvanta ekzemplo ni vidas sinsekvon de frazpartoj kun malkreskanta topikeco:

- (5) *La reconstruo post la dua mondmilito koncernis ankaŭ la junularan movadon ... Ĝi aranĝis du kongresojn ... El ĝiaj vicoj eniris la ĝeneralan movadon multaj aktivuloj.* (El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2006)

En la enkonduka frazo *junularan movadon* fariĝis la topiko, kiu estas reprenita per *Ĝi* kaj *el ĝiaj vicoj* en la dua kaj tria frazoj. Daŭras la topikeco, sed malpli forte, en la grase presita *la ĝeneralan movadon*, lasante la pli orelfrapan frazfinan lokon al tiu frazparto, kiu havas la plej grandan novovaloron: *multaj aktivuloj*. Aliaj ekzemploj de VOS estas klaraj dekstrenŝoj de kompleksa aŭ peza S el la baza SVO. Fine, la vicordo VSO estas trovebla en neglektinde malgranda nombro da kazoj, en kiuj neniu pragmatika aŭ struktura faktoro estas rekonebla. Provizore tiuj kazoj estas konservataj en la kategorio de la sekundaraj faktoroj: stilpreferoj, iu interpreto far la aŭtoro de la belsonco aŭ klareco de la teksto, la eventuala influo de la gepatra lingvo aŭ al iu simpla arbitraĵo.

Interesa struktura efekto, observebla en la korpuso kaj ne anticipita en UL/FdE, estas la eĉ pli granda dominado de SVO, kiam la objekto estas plurala. Kombiniĝas kun tio la malpliofteco de ĉiuj permutoj, kiuj havas nefrazfinan objekton, kaj la kompleta manko de SOV. Ĉio ĉi indikas, ke la plurala objekto pli malfacile moviĝas antaŭen ol la singulara, kio devas esti rezulto de tio, ke oni sentas la pluralan objekton signife pli peza ol la singularan.

#### 4.1.2 La negacio

La dua esplortemo koncernas la lokadon de la negacia partikulo *ne* por krei nean frazon. Laŭ la analizo de UL/FdE ĝia baza loko manifestiĝas antaŭverba (NegV) en frazoj neaj, sed cetere informneŭtraj, tiel en la kazo de tutfrazo, kiel en la kazo de frazparta negacio. Ekzemplo de tutfrazo neo estas:

- (6) *La lakto ne estas malvarma.*

En (6) la neo trafas la predikaton *estas varma*, alivorte la kompleta tezo pri la varmeco de la lakto, t.e. la kompleta pozitiva frazo *La lakto estas malvarma* estas neata de (6). Ekzemplo de senemfaza frazparta neo estas:

- (7) *Mi ne ŝatas lakton en la vespero.*

En (7) la neo ne trafas la trinkadon de lakto ĝenerale, sed nur ĝian konsumon vespere. La neo koncernas, do, ekskluzive la tempnan adjekton en la frazo, malgraŭ tio, ke la partikulo *ne* staras relative malproksime de ĝi, antaŭ la verbo kaj la rekta objekto. Tiajn kazojn reprezentas la maldekstra parto de la sekvanta tabelo III, kiu resumas la rezultojn de la esploroj de UL/FdE:



Sen kontrasto		Kun kontrasto	
<i>ne</i> antaŭverba	<i>ne</i> postverba	<i>ne</i> antaŭverba	<i>ne</i> postverba = antaŭfokusa
100,0%	0,0%	38,1%	61,9%

Tabelo III: Negaciŝablonoj en UL/FdE.

La dekstra parto de la tabelo III redonas la kazojn de emfaza negacio pro la apliko de kontrasta fokuso. Tiu ĉi esprimo de la negacio estas, do, informe neneŭtra. Ekzemplo de la majoritata, postverba meto de *ne* (61,9% laŭ la tabelo III) estas:

(8) *Mi ŝatas lakton ne en la vespero, sed en la mateno.*

En (8) la neo denove koncernas la periodon de la tago, dum kiu la parolanto nevolonte trinkas lakton (*neŝato en la vespero*), sed la neatan periodon tuj sekvas alternativa, kiu estas pozitiva (*ŝato en la mateno*). Kombinante la esplorojn de UL/FdE kaj de la lerniloj oni povas resume diri, ke:

- En la plej multaj kazoj, la preskribita loko de *ne* estas antaŭverba. Plej ofte *ne* rolas kiel nea frazoperatoro, kelkfoje tamen ĝi difinas frazpartan negacion senfokusan (laŭ la ekzemploj en [6] kaj [7]).
- Kiam *ne* ne staras tuj antaŭverbe, kutime postverbe, neniam temas pri tutfrazo negacio. Aŭ temas pri frazparta negacio fokusa, kun *ne* tuj antaŭ la emfaze neata poluso, devige sekvata de kontraŭpoluso (laŭ la ekzemplo de [8]), aŭ temas pri negacio sub la nivelo de la predikataĵo, t.e. la vortnegacio (ilustrebla per vortoj kiel *nevolonte*, *neafabla*, k.t.p.).
- Eventuala liven-reloko de *ne* (de postverba al antaŭverba), ankaŭ en kazoj *kun* kontrastfokuso, sekvus ekzemplojn el du kategorioj de lerniloj kaj restus konforma al la lingvaĵo en UL/FdE. Ilustre ni povus ŝanĝi (8) al *Mi ne ŝatas lakton en la vespero, sed en la mateno.*
- Eventuala dekstren-reloko de *ne* (de antaŭverba al postverba), ankaŭ en kazoj *sen* kontrastfokuso, sekvus ekzemplojn el du aliaj kategorioj de lerniloj, sed kontraŭdirus la lingvaĵon en UL/FdE.<sup>19</sup> Ekzemplo estus (7) ŝanĝita al *Mi ŝatas lakton ne en la vespero.*

La laste menciita dekstren-reloko apenaŭ troviĝas en la lingvouzo de la korpuso:

Sen kontrasto		Kun kontrasto	
NegV	VNeg	NegV	VNeg
99,6%	0,4%	30,2%	69,8%

*Tabelo IV: Ŝablonoj de {Neg, V} en la korpuso.*

Trairante la tabelon IV de live dekstren, mi citu jenajn ekzemplajn frazojn, en kiuj la neata frazparto estas grase presita:

- (9) *Tiu ĉi artikolo ne **detale** pritraktos ilin.*  
(El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2006)

Kvankam la grandega plimulto de la okazoj de NegV en la maldekstra kolumno estas tutfrazaj negacioj, la supra frazo (9) volas ilustrati okazon de senkontrasta (senfokusa) frazparta negacio: la neo trafas ekskluzive la detalecon de la pritrakto kaj la frazo mem restas pozitiva.

- (10) *La relativa manko de lingva demokratio devas ne **senkuraĝigi** nin.*  
(El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2006)

La frazo (10) rilatas al la dua kolumno. La verbo *devi* estas uzata kun ties neprope modala signifo: sekvi iun *neceson* aŭ *fremdan sintrudantan volon* (NPIV: 231). Se *ne* starus antaŭ *devas*, ĝi efike neus la neceson, ke oni perdu la kuraĝon. En la ekzemplo, kontraŭe, la pozitiva trudo *devas* trafas iun nedezirataĵon. Eble la manko de iu alternativo (Se ne perdi la kuraĝon, kion volas la parolanto, ke ni necese faru?) klarigas la maloftecon de senkontrasta VNeg kompare kun NegV.

- (11) *La plej multaj ne kultivas **grenon** sed tabakon.*  
(El la jarkolekto de *Monato* 2002)

En la supra frazo (11), kiu rilatas al la tria kolumno, la neo emfaze (per kontrastfokuso) trafas la frazparton *grenon*, por kiu la alternativo *tabakon* estas menciata. *Ne* rolas ĉi tie kiel nuliga vortoperatoro kaj la frazo kiel tuto, kiu asertas pri kultivado, restas pozitiva. La ĉi-okaza strukturo NegV montriĝas minoritata laŭ tabelo IV. Ni do pasu al ekzempla frazo de la lasta, dekstra kolumno:

- (12) *Ĝi [La vino] estas ne **uva** sed riza.*  
(El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2006)

Simile al (11), la frazo (12) montras emfazan neon de frazparto (*uva*, t.e. *vinbera*) kun mencio de alternativo (*riza*). La frazo kiel tuto, kiu asertas pri la vineco, ĉu de uvaĵo, ĉu de rizaĵo, restas pozitiva. Se la strukturo de (11) manifestiĝas minoritata, tiam, konsekvence, la ĉi-kolumna VNeg estas majoritata. La rezultoj de la korpusa esploro konfirmas la konstatojn faritajn sur la bazo de UL/FdE kaj de la lerniloj de Esperanto, resumitajn sub la tabelo III, kun la escepto de margene pli alta tendenco, uzi VNeg en okazoj sen emfazo aŭ kontrastfokuso (ĉu pro certaj lerniloj?).

### 4.1.3 La substantiva vortgrupo

La tria esplortemo koncernas la konsiston de la substantiva vortgrupo, en kiu rolas unu substantivo (N) kaj minimume unu adjektivo (A). La sekvanta tabelo V resumas la analizon de ĉiuj frazoj kun vortgrupo(j) kun A kaj N en UL/FdE:

AN	NA
88,0%	12,0%

*Tabelo V: Distribuo de {A,N} en UL/FdE.*

La kombinita esploro de UL/FdE kaj de la lerniloj estas resumebla jene:

AN estas la baza vicordo. La apliko de NA meritas konsideron, se:

- A bezonas emfazon.
- A estas kompleksa, konsistanta ekzemple el pli ol unu adjektivo kaj/aŭ adjektivo modifita de adverbo aŭ de suplemento.
- la N-pozicion okupas korelativo.
- manifestiĝas certaj specialaj cirkonstancoj (fiksaj esprimoj, alparoloj, belsoneco).

La korpuso montras jenan distribuon de AN kaj NA:

AN	NA
96,4%	3,6%

*Tabelo VI: Distribuo de {A,N} en la korpuso.*

Se ni nomas neŭtra la cirkonstancon sen emfazo, kvazaŭ ekster la kunteksto kaj krome sena je iu el la specialaj kvalifikoj ĉi-sube listigitaj, la elekto inter AN kaj NA sekvas la implicon *Se neŭtra, tiam AN*. Kvankam tio signifas, ke ankaŭ en neneŭtraj cirkonstancoj AN estas tute akceptebla, tamen ĝuste tiam la permuto NA montriĝas tre ofta. Ekzemplo de emfazo de A (per grase presita kontrastfokuso) estas:

- (13) *La sintaksa logiko de lingvoj kaj logiko **sciencia** ja ne samas.*  
(El la jarkolekto de *Monato* 2002)

Specialaj mi nomas kvin cirkonstancojn, kiuj estas: 1. la jaro en dato; 2. titolo aŭ surskribo; 3. propraj nomoj; 4. korelativoj kaj substantivigitaj kvantaj adjektivoj; 5. kompleksa modifo de N. Ekzemploj de la uzo de NA en tiaj kazoj estas: 1. *la jaro 1907-a* (El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2002); 2. *Medalo **duflanka*** (El la jarkolekto de *Monato* 2002); 3. *Revuo **Orienta** kaj Ĉina Radio **Internacia***; 4. *io **erara** kaj multon **novan*** (El la jarkolekto de *Monato* 2002); 5. *trakto **iom moka, satira** kaj la ordinara lingvo **nuntempa*** (El la jarkolekto de *Monato* 2002). En propraj nomoj kaj kompleksaj modifoj oni ofte trovas ANA aldone al NA, kunigitajn sub NA en la dekstra kolumno de tabelo VI.

La konsisto de la substantiva vortgrupo {A,N} en la korpuso ĝenerale sekvas tiun de UL/FdE kaj de la lerniloj de la lingvo. La kriterioj por devii de la baza ordo AN estas klare rekoneblaj kaj restis la samaj. La proporcio de AN en la korpuso estas eĉ pli granda ol en UL/FdE, verŝajne pro la fakto, ke la plej frua materialo estas multe pli ekzemplodona, kun pli da kontrastoj, ol la pli ordinara tekstaro de la korpuso. La grandega superrego de AN konfirmas, se ĝi ne plifortigas, la bazecon de AN.

#### 4.1.4 Manieraj kaj gradaj adjektoj

La kvara esplorkampo koncernas la lokadon de manieraj kaj gradaj adjektoj rilate al la ĉefverbo. La sekvanta tabelo VII resumas la analizon de ĉiuj koncernaj frazoj kun tiaj adjektoj en UL kaj FdE:

AdvV	VAdv
50,0%	50,0%

*Tabelo VII: Distribuo de {Adv,V} en UL/FdE.*

La kombinita esploro de UL/FdE kaj de la lerniloj estas resumebla jene:

- La adjekto, konsistanta el maniero aŭ grada adverbo, montras liberan variigeblon inter antaŭverba kaj postverba uzo.<sup>20</sup>

Tio signifas, ke frazoj de la tipo *La trajno **rapide** veturas de Amsterdamo al Parizo* estas troveblaj same ofte, kiel *La trajno veturas **rapide** de Amsterdamo al Parizo*. La korpuso, tamen, montras jenan distribuon de {Adv,V}:

AdvV	VAdv
79,0%	21,0%

*Tabelo VIII: Distribuo de {Adv,V} en la korpuso.*

La prefero por AdvV aŭ VAdv estas klara, sed malpli absoluta ol en la kazo de la adjektivo, kiu modifas substantivon (revidu la tabelon VI). Tion ilustru la sekvantaj du ekzemplaj frazoj, kun starantaj en la fontdokumento:

(14) *Ankaŭ la disfalo de Ĉeĥoslovakio **negative** influis la situacion.*  
(El la jarkolekto de *Monato* 2002)

(15) *Multaj ... ekonomikistoj prijuĝas la trapason ... **negative**.*  
(El la jarkolekto de *Monato* 2002)

kun AdvV en (14) kaj VAdv en (15), ambaŭ kun la sama adverbo en la sama, ŝajne senemfaza kunteksto. VAdv, precipe kun dekstrenŝovo de Adv al la fino de la frazo aŭ subfrazo, montriĝas alloga opcio, se Adv estas emfazita aŭ estas parto de kompleksa modifanto de V:

(16) *La bulteno 'La Verda Sago' ne plu aperos **papere**, sed nur rete, ...*  
(El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2002)

kaj

(17) *La kandidatoj devas paroli ... **libere**, sen anticipa skribita teksto.*  
(El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2002)

Diference de UL/FdE kaj de la lerniloj de la lingvo, la korpuso montras signifan preferon por AdvV, kiun subtenas klare rekoneblaj kialoj por ŝanĝi tion al VAdv, nome pragmatikaj kaj strukturaj.

### 4.1.5 Du objektoj

La lasta esplortemo koncernas la lokadon de la rekta objekto O rilate al la nerekta objekto IO, t.e. la distribuon de  $\{O, IO\}$ . La sekvanta tabelo IX resumas la analizon de ĉiuj koncernaj frazoj kun po du kune okazantaj objektoj en UL/FdE:

$O_{\text{Nom}}-IO_{\text{Nom}}$ :	2	$IO_{\text{Nom}}-O_{\text{Nom}}$ :	9
$O_{\text{Nom}}-IO_{\text{Pron}}$ :	1	$IO_{\text{Pron}}-O_{\text{Nom}}$ :	28*
$O_{\text{Pron}}-IO_{\text{Nom}}$ :	1	$IO_{\text{Nom}}-O_{\text{Pron}}$ :	0
$O_{\text{Pron}}-IO_{\text{Pron}}$ :	1	$IO_{\text{Pron}}-O_{\text{Pron}}$ :	0
Sume O-IO:	5	Sume IO-O:	37

*Tabelo IX: Ŝablonoj de kunokazantaj O kaj IO en UL/FdE.*

Por interpreti la tabelon, la leganto trairu la maldekstran kolumnon de supre suben kaj pensu pri  $O_{\text{Nom}}-IO_{\text{Nom}}$  kiel *la libron al la filo*; pri  $O_{\text{Nom}}-IO_{\text{Pron}}$  kiel *la libron al li*; pri  $O_{\text{Pron}}-IO_{\text{Nom}}$  kiel *ĝin al la filo*; kaj pri  $O_{\text{Pron}}-IO_{\text{Pron}}$  kiel *ĝin al li*. La dekstra kolumno montras en ĉiu linio la inversan vicordon. Se ni volas reuzi la kondiĉon pri informneŭtreco por serĉi iun bazan ordon de O kaj IO, tuj montriĝas, ke el la naŭ okazoj de  $IO_{\text{Nom}}$  sekvataj de  $O_{\text{Nom}}$  forfalas ses. Tio ne nur indikas la pragmatikan influeblon de la kombino  $\{O, IO\}$ , sed ankaŭ ekvilibrigas la rezultojn de la tabelo IX en la kazo de du plennomaj objektoj. Restas la granda prefero por IO-O, kiam IO estas pronoma. La kombinita esploro de UL/FdE kaj de la lerniloj estas resumebla jene:

- Ne troveblas apriora prefero por la sinsekvo O-IO aŭ IO-O.
- La sinsekvo de O kaj IO estas pragmatike influebla.
- La strukture pli peza argumento prefero lokiĝas malantaŭen.

La korpuso montras jenan distribuon de O kaj IO:

$O_{\text{Nom}}-IO_{\text{Nom}}$ :	111	(a)	$IO_{\text{Nom}}-O_{\text{Nom}}$ :	48	(b)
$O_{\text{Nom}}-IO_{\text{Pron}}$ :	7	(c)	$IO_{\text{Pron}}-O_{\text{Nom}}$ :	71	(d)
$O_{\text{Pron}}-IO_{\text{Nom}}$ :	16	(e)	$IO_{\text{Nom}}-O_{\text{Pron}}$ :	1	(f)
$O_{\text{Pron}}-IO_{\text{Pron}}$ :	8	(g)	$IO_{\text{Pron}}-O_{\text{Pron}}$ :	1	(h)
Sume O-IO:	142	(54,0%)	Sume IO-O:	121	(46,0%)

*Tabelo X: Ŝablonoj de  $\{O, IO\}$  en la korpuso.*

\* Ne kalkulante 15 ripetojn de la sama ekzemplo, sed kun aliaj tempoj kaj modoj en la konjugado (vd. FdE: 108-109).

La ŝajna suma preskaŭ-ekvilibro de O-IO kaj IO-O (54,0%-46,0%) reale konsistas el du kontribuoj, kiuj unuope estas tre malekvilibraj. Kiam O kaj IO estas ambaŭ plennomaj (laŭ la antaŭa ekzemplo: *la libron al la filo*) aŭ pronomaj (*ĝin al li*), la preferata vicordo estas O-IO en 70% de la tuto, kiel rezultas el la kalkulo de  $(a+g)/(a+b+g+h)$ . Kontraŭe, kiam unu el la objektoj estas pronomaj, la preferata vicordo estas Pron-Nom en 92% de la tuto (*ĝin al la filo kaj al li la libron*), kiel rezultas el  $(d+e)/(c+d+e+f)$ . Oni povas, ĉi-etape, supozi, ke la baza objektordo estas O-IO, kiu rekonfirmiĝas en la kazo de (malpeza) pronomaj O, sed inversiĝas al IO-O en la kazo de (malpeza) pronomaj IO. Kelkaj ekzemploj el la korpuso (kun grase presitaj objektoj) estas:

(18) *Li diktis sian verkon al Rustichello*. (El la jarkolekto de *Monato* 2002)

kun du sampezaj, plennomaj objektoj *sian verkon kaj al Rustichello* en la vicordo O-IO, kaj:

(19) *Oni eĉ riproĉas tion al mi*. (El la jarkolekto de *Revuo Esperanto* 2003)

kun la du sampezaj, pronomaj objektoj *tion kaj al mi*, same en la vicordo O-IO. Frazo kun pronomaj O *ĝin* kaj plennomaj IO *al viaj idoj* estas:

(20) *Legu ĝin al viaj idoj!* (El la jarkolekto de *Monato* 2003)

En (20) la malpeza O antaŭas la pli pezan IO. Kontraŭe, en (21):

(21) ... *diktante al vi siajn aventurojn*. (El la jarkolekto de *Monato* 2002)

la malpeza IO *al vi* antaŭas la pli pezan O *siajn aventurojn*. La rezultoj de la korpusa esploro konfirmas la konstatojn faritajn sur la bazo de UL/FdE kaj de la lerniloj de Esperanto, kiuj estas resumitaj sub la tabelo IX.

## 4.2 La kompletiga eksperimento: konkludoj

La eksperimento pravas, ke el la kvin esplorkampoj, al kiuj estis koncentrita la korpusa esploro, kvar montras bazan ordon de la frazpartoj, kiu estas esprimebla *sintakse*. Ili estas SVO, NegV, AN kaj O-IO ĉe sampezaj objektoj. En la kazo de {Adv, V} la korpusa esploro montras statistike signifan preferon por AdvV, sed la rezultoj el la eksperimenta esploro estas malpli klaraj.

Al tiuj trovaĵoj la eksperimento alportas jenon. Sur ĉiuj kvin kampoj la fine decidota vortordo por la diraĵo estas direktata de tri diversspecaj stirfortoj:

*pragmatikaj, semantikaj kaj strukturaj*, kiuj kapblas aŭ plifortigi aŭ kontraŭi sin reciproke. La roloj ludataj de la pragmatikaj kaj semantikaj stirfortoj konformas al la elirpunktoj de FG. La struktura stirforto konformas al la kognaj limigoj al la cerba kapablo prilabori kompleksajn lingvostrukturojn, t.e. la stokigo de la laŭvice produktataj lingveroj en la mallongdaŭran memoron ne estu ĝenata de kompleksaj akcesoraĵoj.<sup>21</sup> La sekvantaj ekzemplaj frazoj estas tiritaj el la respondoj al la demandoj de la enketo, kiu formis la bazon de la eksperimento.

La korpusa esploro jam montris la rolon de la pragmatiko ĉe la ordigo de S kaj O rilate al V: influate de la pragmatikaj funkcioj fokuso kaj topiko, tiel ĉe S, kiel ĉe O, kiel ankaŭ ĉe V, manifestiĝis tia moviĝemo, ke ne malpli ol dek procentoj de ĉiuj eblaj aperoj de S, V kaj O en iu permuto devias de la baza ordo SVO (revidu tabelon II). La eksperimento pruvus, ke la periferiaj pozicioj en la frazo montriĝas tre taŭgaj por akcepti fokusajn frazpartojn.<sup>22</sup> Du trionoj de la enketitoj, kiuj povis elekti inter kvin liberaj lokoj por emfaza aldono de la tempa adjekto *morgaŭ* produktis ***Morgaŭ mi finos mian raporton*** kun la fokusa adjekto frazkomence. La inversigo de frazpartoj, kun la celo enfokusigi tiun aŭ alian elementon, montriĝas pli komuna ol la uzo de la fendita frazo. Konfrontite kun situacio, en kiu la enketito avide deziris iun specifan pomon el propono de pomoj kaj piroj, la tiom dezirata objekto *tiu pomo* estis inversigita el la baza ordo SVO per OSV ***Tiu pomon mi volas*** statistike signife pli volonte, ol per la fendofrazo *Estas tiu pomo, kiun mi volas*. Konfrontite kun situacio, en kiu la enketito malkovris, ke la libro, kiun tiel li, kiel liaj akompanantoj tiom deziras, estas la lasta havebla ekzemplero, la emfaze nerva subjekto *mi* estis inversigita el la baza ordo SVO per OVS ***Tiu libron volas mi*** statistike signife pli volonte, ol per la fendofrazo *Estas mi, kiu volas tiun libron*.

Kiam el la tri loze prezentitaj partoj *la sekretario, preparos kaj la raporton* oni devis konstrui la plej efikan frazon kun la subjekto kontrastfokusa, kvarono forlasis la bazan ordon SVO favore al alia, el kiu la plimulto elektis OVS ***La raporton preparos la sekretario***, kun frazfina fokuso. Simile, sed ĉe kontrastfokusa objekto, eĉ triono rezignis pri la baza ordo kaj elektis senescepte la frazkomencan lokon por la fokusa objekto: aŭ OVS ***La bilancon preparos la kasisto*** aŭ OSV ***La bilancon la kasisto preparos***. En la kazo de kontrastfokusa verbo, unu el kvin enketitoj preferis iun nebazan ordon kaj ankaŭ ĉi-kaze la plimulto elektis periferian lokon por la verbo: aŭ OSV ***La oficejon la asocio aĉetos*** aŭ VOS ***Aĉetos la oficejon la asocio***.

Videblas klara tendenco sekvi la t.n. LR-Principon, esprimitan en la formo de la sinsevo Topiko-Komento (TC).<sup>23</sup> Tre kutimaj estas inversigoj de frazpartoj cele al la antaŭenigo de la topiko.<sup>24</sup> En konversacia ĉeno, kiu temis pri nova vortaro, la enketitoj, povantaj elekti inter tri diversaj frazstrukturoj



por komenti, ke multaj personoj jam mendis la novaperaĵon, plimulte restis ĉe la baza ordo, aŭ elektis OVS *Ĝin mendis jam multaj personoj*. En la kazo de topika objekto, kiun oni volus iel forigi el ĝia kutima frazfina loko (SVO), la pasivigo de la frazo ne ĝuas preferon kompare kun la inversigo. En konversacia ĉeno, kiu temis pri la grandaj lingvoj en la mondo kaj la disvastiĝo de la angla, la enketitoj, povantaj elekti inter tri diversaj frazostukturoj por komenti, ke la brita registaro forte subtenas la lingvon, plimulte restis ĉe la baza ordo, aŭ elektis sen signifa prefero inter la pasiva formo *Ĝi estas forte subtenata de la brita registaro* aŭ OVS *Ĝin forte subtenas la brita registaro*.

En la kazo de la negacio, la pragmatika influo manifestiĝas kiel ŝovo de *ne* el ties antaŭverba pozicio en la antaŭfokusan pozicion, kiam sekvas eksplicita kontrasto: de *La knabino ne iras haste* al *La knabino iras ne haste, sed trankvile*. Ene de la substantiva vortgrupo, NA estas volonte elektita vicordo en la kazo de enfokusigita adjektivo. La bazeco de AN montriĝas tre stabila, precipe en la kazo de mallongaj, ordinaraĵaj adjektivoj kiel *juna*. Tiu stabileco estas tiel forta, ke eĉ en la kazo de kontrastfokuso la tendenco je inversigo ‘de elira AN al NA’ montriĝas malpli forta ol tiu ‘de elira NA al AN’. Ree sur la nivelo de la frazo, la enketitoj montras statistike nesignifan preferon por la ordo VAdv, en kiu la maniera adverbo estis *bele*. Tiu ĉi rezulto kontraŭas la preferon trovitan en la korpusa analizo, kiu estis AdvV. La fina elekto inter AdvV kaj VAdv estas klare influata de la eventuala enfokusigo de Adv, pro kiu la adverbo moviĝas eĉ pli decide malantaŭen. La sinsekvo O-IO montriĝas influebla de la funkcioj fokuso kaj topiko.<sup>25</sup> Post la topikigo de *libro* en la enkonduka frazo *Jen bela libro!*, 80% de la enketitoj preferis la daŭrigon *Mi donacos ekzempleron al Johano*, aligante la bazecon de O-IO ĉe sampezaj objektoj al la antaŭenigo de la topiko. Konfrontite kun enkonduka frazo, kies topiko estis la posta IO *Jen mia filino!*, la prefero por O-IO ĉe du dusilabaj objektoj malpliigis al 63% pro la antaŭenŝovo de la topika IO en la alternativa daŭrigo *Mi donacos al ŝi libron*.

Semantikaj stirfortoj influantaj la fine decidotan vortordon estas indikeblaj, sed malpli okulfrappe ol la supre priskribitaj pragmatikaj. Ekzemple, ia influo de la vivanteco/senviveco de S, O aŭ IO sur {S,O} aŭ {O,IO} ne estis montrebla. Kontraŭe, la (ne)difiniteco de la objekto iom kundeterminis ĝian antaŭenmoveblon: al la demando *Kiun vi vidis?* respondo kun difinita objekto *La princon mi vidis* montriĝis pli facile formulebla ol kun nedifinita objekto *Reĝon mi vidis*, eĉ malgraŭ la pli granda pezo de *La princon*. En kunordigoj el du loze prezentitaj kontribuoj de A kaj B en arbitra ordo, la rezulto *A kaj B* sisteme havis la pli pozitivan aŭ pli vivantan elementon antaŭ la malpli pozitiva aŭ vivanta: *generalo kaj kaporalo, homo kaj domo*, k.s.<sup>26</sup>

La struktura stirforto estas trovebla sur ĉiuj kampoj esploritaj en la eksperimento.<sup>27</sup> En la kazo de {S,V,O} tio signifas, ke plennomaj frazpartoj

estas interpretataj pli kompleksaj ol pronomaj. La korpuso montris, ke, en la ĉeesto de pronomaj objektoj la distribuo de la permutoj de S, V kaj O estas konsiderinde alia ol en la ĉeesto de plennomaj objektoj. Rezultis jenaj rondigitaj procentaĵoj: kontraŭ 90% da SVO en la kazo de plennomaj objektoj, nur 55% de la esploritaj frazoj kun pronomaj objektoj montris la bazan ordon kaj 13% de la frazoj montris SOV. En la eksperimento 13% el la enketitoj, uzintaj SVO en *La studento legas la libron*, transiris al SOV *La studento ĝin legas* pro la malplipezo de la objekto. Oni povus diri, ke la trovita baza ordo SVO estas subtenata de du universalaj, la konfirmita prefero por la ordo SO kaj la konfirmita pli granda firmeco de la ligo inter O kaj V ol tiu inter S kaj V.<sup>28</sup> La kombino de la du fenomenoj donas S + VO = SVO en la kazo de plennomaj objektoj, konkuranta kun fortiĝinta S + OV = SOV en la kazo de pronomaj objektoj. En la kazo de {A,N} la bazeco de AN plej signife montriĝas ĉe simplaj adjektivoj kiel *grasa* kaj *juna* kaj malpli signife ĉe pli pezaj kiel *bongusta* kaj *multmakula*. En la kazo de {Adv,V} la prefero VAdv estas minimuma por *bele*, pli klara por la apenaŭ aŭ iom pli pezaj *raŭke* kaj *malbele*, sed tre signifa por ekzemple *emocie* kaj *korŝire*. Ni diru, ke la eksperimento konfirmas la rezultojn el la korpusa esploro, t.e. repriskribas la samajn ŝablonojn, sed aldonas al tio klarigojn pragmatikajn, semantikajn kaj strukturajn.

Rezulte de la komparo, kiujn mi faris inter fenomenoj troveblaj en la lingvaĵo de 1887 kaj tiuj en la nuntempa lingvaĵo, oni rajtas supozi, ke la evoluo inter 1887 kaj 2007 okazis sen grandaj malkontinuaĵoj. En UL/FdE nombre dominis SVO, sed ne ĉiuj aliaj permutoj de S, V kaj O jam ĉeestis. Tamen, pragmatikaj kaj strukturaj motivoj por forlasi SVO estas retroveblaj jam en tiuj plej fruaj zamenhofaj tekstoj. La du ebloj O-IO kaj IO-O estis ekvilibre reprezentitaj, sed jam montris grandan strukturan influeblon. AN forte dominis, sed jam malkaŝis preferon por inversiĝo en la kazo de komplekseco kaj/aŭ fokuseco de A. En la plej frua materialo zamenhofa, Adv ŝajnas manifesti sin libere movebla inter la antaŭverba kaj postverba pozicioj. Ĉi-kaze ankaŭ la esplorita materialo nuntempa en la korpuso kaj en la eksperimento ne montras unusencan preferon por tiu aŭ alia sintakse esprimebla elekto.

Subtilan diferencon inter UL/FdE kaj la nuntempa lingvaĵo de Esperanto ni trovas en la negacio. En UL/FdE ne atesteblas VN<sub>Neg</sub> sen eksplicita kontrasto, sed tiu strukturo aperas, kvankam tre margene, en la esplorita korpuso. En la respondoj de la enketitoj ĝi formas neneglekteblan malplimulton, kiu iras de 3% de la enketitoj ĉe predikata substantivo, *Tio ĉi estas ne lernejo*, al 18% ĉe maniera adjekto, *La knabino iras ne haste* (ĉe predikata adjektivo neniu enketito uzis VN<sub>Neg</sub>: \**La rano estas ne granda* ne estis registrita). La unua konstato estas, ke tiu limigita uzo substrekas la grandan stabilecon de NegV,

kun aŭ sen kontrasto. La iom nekohera uzo de NegV kaj VNeg ŝajnas fonti en la forma identeco en Esperanto (*ne*) de la nuliga vortoperatoro (kiel en *ne kultivas grenon, sed tabakon*, vd. frazon 11; kp. angle *no*), la ofte aparte skribita negacia prefikso (vd. ĉi-supre *ne haste* aŭ *nehaste*; kp. angle *un-*) kaj la nea frazoperatoro (vd. ĉi-supre *La rano ne estas granda*; kp. angle *not*, en multaj kazoj akompanata de la helpverbo *do*). Ekzistas lernolibroj, kiuj ignoras la diferencon inter tiuj tri formoj de neado. Se nuligita vorto X (precipe en objekta funkcio) hazarde staras postverbe, la strukturo NegX estus interpretebla sur tutfrazo nivelo kiel rezulto de inversigo  $NegVX > VNegX$  por doni pli da emfazo al la neo de la tuta frazo. Tia interpreto fiaskas, ĉar la formovo de *ne* el ties tuj antaŭverba pozicio rekte subfosus tion. Se mi volas emfaze nei la fakton, ke mia libroproduktado konsistas el verkado (anstataŭ, ekzemple, el diktado), ankaŭ ne taŭgus la frazo *Mi verkas ne libron*, ĉar la neverkado supozigus *ne* tuj antaŭ si mem. Alia frazparta interpreto povus eliri de la oftege atestita NegVX kiel baza ordo por la senemfaza negacio de X (vd. supre *ne iras haste*), tiel ke VNegX devus reprezenti la emfazan negacion de X (kp. *iras ne haste*). Ankaŭ tiu ĉi interpreto estus malsukcesa, ĉar tia negacio, laŭ la atestaĵoj en UL/FdE, postulus eksplicitan kontraston, t.e.  $VNegX$  devas esti sekvata de *sed Y*. Konfirmas tion la korpuso kaj, malpli eksplicite, la eksperimento. Aplikate al la emfaza vortnuligo, tio signifus, ke ankaŭ ĉi tie ne taŭgus la frazo *Mi verkas ne libron*, ĉar ĝin devus sekvi senpere la kontrasto *sed broŝuron* (aŭ alia alternativo). Ebla elturniĝo por la fokusa, sed ne kontrastfokusa, vortnegacio estas la alternativo *Libron mi ne verkas*, en kiu la neverkado emfaze trafas la objekton en ties fokusa pozicio OSNegV. Konklude, VNeg sen eksplicita kontrasto ĝenerale ŝajnas esti spertata kiel diraĵo *nefinita*, iel kolizianta kontraŭ la postuloj pri kompleteco kaj rileveco en komunika kunteksto.<sup>29</sup> Tio, ke la uzo de senkontrasta VNeg aperas minoritata aŭ eĉ marĝena en la nuntempa lingvaĵo, povus pruvi, ke la parolantaro subkonscie dementas la jen kaj jen trosimpligite formulitan regulon pri la negacio en iuj lerniloj (*La vorto 'ne' staru antaŭ tio, kion oni volas nei*) pro ties komunika neakceptebla en certaj kazoj.

Pro la kongruo de la korpusa kaj eksperimenta rezultoj kaj la kohero inter la diversaj kontribuoj al la eksperimento estas pravigeble supoziti, ke la vortorda sistemo en nuntempa Esperanto, almenaŭ sur la kampoj ĉi tie esploritaj, respegulas aŭtonoman sistemon. Estas evidente, ke la influo de la gepatra lingvo sur la lingvouzon de iu ajn esperantisto estas malfacile, se entute, eliminebla. Krome, la finfina vortordo, kiun oni aplikas, estas ĉiam kompromisa rezulto inter la diversaj interbatalantaj stirfortoj, en kiu la personaj gusto, prefero kaj eĉ arbitro estas neniel ekskluditaj. Se mi insistas pri la aŭtonomeco de la sistemo, mi do aludas al sistemo ne de fiksaj matematikaj reguloj, sed de klare rekoneblaj tendencoj. Kun tiuj rezervoj pruviĝis, ke la

fina decido pri la vortordo, kiun parolanto elektas por sia konkreta diraĵo, estas direktata de faktoroj pragmatikaj, semantikaj kaj strukturaj. La detalaj analizoj kiuj kondukis ĉi tien montras, ke tiu procezo konformas al la elektitaj universalajĵoj. Sekve, la konkludon pri la aŭtonomeco de la vortordo en Esperanto ni povas plivastigi per la konstato, ke ĝi reprezentas krome naturan sistemon.

Kelkajn finvortojn mi volas dediĉi al SVO, ĝuste ĉar la baza ordo sekvanta el {S,V,O} estas tre ofte uzata ilo por klasi lingvon sintakse. La analizoj post la tabelo I montris, ke jam en siaj plej fruaj dokumentoj Esperanto estis SVO-tipa. Konsiderante, ke ĉiuj modernaj hindeŭropaj fontlingvoj de Esperanto estas de la sama tipo, ni povus diri, ke tiu elekto de Zamenhof estis ‘natura’ en la tria PIV-a signifo de ‘memkomprenebla’. Sed tiu natureco montriĝis ankoraŭ pli bonŝanca. Lingvistikaj esploroj en la 20a jarcento pruvis, ke SVO estas la baza ordo en centoj da lingvoj, tutmonde disvastiĝintaj kaj parolataj de la granda plimulto de la homaro. Tiel, la iama zamenhofa memkompreneblaĵo montriĝas natura propraĵo por la plej multaj homoj tutmonde, kiuj rekonas en Esperanto la bazan ŝablonon por konstrui frazojn el sia gepatra lingvo.

Mi pravigis la elekton de Esperanto kiel esplorobjekton, menciante la grandan nombron da sociaj aplikoj de la lingvo, la naturan traktadon de la lingvo far ties uzantoj kaj la grandan liberecon, kiun oni havas por formi konstruaĵojn gramatike korektajn kaj komunike akcepteblajn. Rezulte de la sekvinta esploro, la lingvo, malgraŭ sia neordinara origina konstruiteco, manifestas sin kiel aŭtonoma, evoluanta sistemo, ne kontraŭdiranta la universalajĵojn ĉi tie uzitajn, kaj portata de internacia parolantaro kun klara konscio pri sinreguligo. Ĉi tial Esperanto estas proponenda kiel taŭga testejo, ne nur de ĝenerallingvistikaj teorioj pri vortordo, sed ankaŭ de aliaj hipotezoj kaj teorioj pri la homaj lingvo kaj lingvouzo ĝenerale.

## 5 Veroj kaj duonveroj pri la vortordo en Esperanto

La lerniloj de Esperanto – kaj el la kontraŭa perspektivo: la instruiloj de nia lingvo – ne ĉiam prezentas la tutan veron pri la uzenda aŭ uzinda vortordo. Kelkfoje, inter la veroj troviĝas ankaŭ iuj duonveroj, kies lerno aŭ instruo donus malĝustan bildon pri tiu ĉi grava parto de la sintakso. Kaj ne nur tion: certaj miskonceptoj, se prezentitaj en profesia, ekstermovada medio, estus facile kaj rapide refutotaj, kio riskus sufoki seriozan trakton de nia lingvo ĝenerale. Ĉi-sube mi proponas al la leganto kelkajn praktikajn konsilojn por la ĝusta kompreno de la Esperanta sintakso.

### Ne diru

La ordigo de la partoj de la frazo en Esperanto estas komplete libera.

Ŝanĝi la vicordon de la partoj de la frazo ne ŝanĝas la signifon de la frazo.

Esperanto posedas liberan vortordon dank' al la akuzativo.

### sed diru

La baza ordo en la frazo estas SVO, kiu estas libere modifebla por kontentigi bezonojn ĉefe pragmatikajn (ekz. emfazon, kontraston, envicigon en la priparolatan temon) kaj strukturajn (ekz. la malantaŭenigon de multisilabaj kaj multvortaj frazaj partoj).

Ŝanĝante la vicordon de la frazaj partoj, oni neofte ŝanĝas la signifon (tamen *ne tute* ≠ *tute ne*), sed preskaŭ certe la sencon: *Mi ne parolas angle* estas simpla aserto, sed en *Angle mi ne parolas* povas esti subkomprenata la informo, ke aliaj lingvoj ja estas parolataj de mi.

Ne sola, sed inter aliaj faktoroj, la akuzativo faciligas la ekkonon de la objekto, ekz. en *Petron batas Johano*. En *Petron mortigis la fulmo*, tamen, ĝi estas malpli necesa por komprenigi la mesaĝon.

### Ne diru (daŭrigo)

La nea vorteto *ne* ĉiam staras antaŭ tio, kion oni volas nei.

La adjektivo estas libere lokebla antaŭ aŭ post sian substantivon.

La rekta kaj nereкта objektoj estas libere lokeblaj en la frazo.

Koncerne la lokadon de la maniera adverbo, ni bezonas pliajn esplorojn por eltrovi, ĉu indikeblas iu baza ordo rilate al la verbo, kiun ĝi modifas. Kun certeco eblas diri, ke pragmatikaj kaj strukturaj konsideroj influas la finan ordigon.

### sed diru (daŭrigo)

La baza ordo de la fraza kaj frazparta negacio estas NegV. Por la emfaza frazparta negacio sen kontrasto rekomendindas forlaso de la baza ordo, ekz. en *Bieron mi ne trinkas* la netrinkado trafas emfaze la bieron, sen propono de alternativo. En emfazaj neoj kun kontrasto eblas movi *ne* el NegV antaŭ la neatan fokuson: *Mi trinkas ne bieron, sed vinon*. Vortneoj estu laŭeble skribitaj unuvorte: *nebela, negrave*.

La baza ordo estas AN. Simile al tio, kion ni vidis sub SVO, AN estas libere ŝanĝebla al NA por kontentigi bezonojn precipe pragmatikajn kaj strukturajn.

La baza ordo de sampezaj objektoj estas O-IO. Ĉe diverspezaj objektoj, la malpli peza ofte antaŭas la pli pezan. Pragmatikaj konsideroj plue influas la finan ordon.

## Bibliografio

- ABC** vd. De Vleming kaj Van Damme (1994).
- Behaghel**, Otto (1928) *Deutsche Syntax* (Heidelberg: Carl Winter). Vol. III: *Die Satzgebilde*.
- Blanke**, Detlev (2000) ‘Vom Entwurf zur Sprache’ en Klaus Schubert (red.), *Planned Languages: From Concept to Reality, Part I*, *Tijdschrift voor Toegepaste Linguïstiek*, 15.1 kaj 15.2: 37-89.
- Blümel**, Rudolf (1914) *Einführung in die Syntax* (Heidelberg: Carl Winter).
- Comrie**, Bernard (1983) *Language Universals and Linguistic Typology* (Oksfordo: Basil Blackwell).
- De Saussure**, Ferdinand (1915/1971) *Cours de Linguistique Générale* (Parizo: Payot).
- De Vleming**, Christiane kaj Emile Van Damme (1994) *ABC-Gramatiko de Esperanto* (Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo).
- Dik**, Simon C. (1997) *The Theory of Functional Grammar* (Berlino, Novjorko: Mouton de Gruyter). En du volumoj, redaktitaj de Kees Hengeveld.
- FdE** vd. Zamenhof (1905/1963).
- Gledhill**, Christopher (2000) *The Grammar of Esperanto. A Corpus-Based Description* (Munkeno: Lincom Europa).
- Greenberg**, Joseph H. (1963) *Universals of Language* (Cambridge MA: The M.I.T. Press).
- Grice**, H. Paul (1975) ‘Logic and Conversation’ en Cole, Peter kaj Jerry L. Morgan (red.) *Syntax and Semantics* Vol. 3 *Speech Acts*: 41-58.
- Hawkins**, John A. (1983) *Word Order Universals* (Novjorko, Londono: Academic Press).
- Jansen**, Wim (2007) *Woordvolgorde in het Esperanto* (Utrecht: LOT). Doktoriga disertacio.
- Jespersen**, Otto (1946) *Mankind, Nation and Individual from a linguistic point of view* (Londono: George Allen & Unwin).
- Kalocsay**, K. kaj G. Waringhien (1980) *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (Roterdamo: UEA). Kvara eldono.
- LResp** vd. Zamenhof (1962).
- Mallinson**, Graham kaj Barry J. Blake (1981) *Language Typology* (Amsterdamo: North-Holland Publishing Company).
- Manders**, d-ro W. J. A. (1947) *Vijf Kunststalen* (Purmerend: Muusses).
- Manders**, d-ro W. J. A. (1950/1980) *Interlingvistiko kaj Esperantologio* (Saarbrücken: Artur E. Iltis). Fotografia represo de la originalo.
- NPIV** vd. Waringhien (2002).
- PAG** vd. Kalocsay kaj Waringhien (1980).
- PIV** vd. Waringhien (2005).

- PMEG** vd. Wennergren (2006).
- Tomlin**, Russell S. (1986) *Basic Word Order, Functional Principles* (Londono: Croom Helm).
- UL** vd. Zamenhof (1887/1968).
- Waringhien**, Gaston (red.) (2002) *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (Parizo: SAT).
- Waringhien**, Gaston (red.) (2005) *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (Parizo: SAT).
- Weil**, Henri (1879/1978) *The Order of Words in the Ancient Languages Compared with that of the Modern Languages* (Amsterdamo, John Benjamins). Reeldono de la angla traduko de la franca originalo.
- Wennergren**, Bertilo (2006) *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (El Cerrito CA: ELNA).
- Zamenhof**, L.L. (1887/1968) *Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch* (Varsovio: privata eldono far L.L. Zamenhof). Fotografia represo de la originala germana versio (Saarbrücken: Artur E. Iltis), uzita en tiu ĉi studo.
- Zamenhof**, L.L. (1905/1963) *Fundamento de Esperanto* (Parizo: Hachette). Redaktita de A. Albault.
- Zamenhof**, L.L. (1962) *Lingvaj respondoj, konsiloj kaj opinioj* (Marmande: E.F.E.). Redaktita de G. Waringhien.

**Glosaro** (inter krampoj staras la mallongigoj uzitaj en la teksto)

**Argumento** Frazparto, kies nepran ĉeeston preskribas la predikato. Ekzemploj povas esti la subjekto en *Mi iras* kaj la subjekto kaj rekta objekto en *Mi rompita tason*.

**Fleksio** Procezo, laŭ kiu iu gramatika kategorio (ekz. la substantivo) aŭ funkcio (ekz. la objekto) esprimiĝas per forme rekonebla markilo interne de vorto (resp. per *-o* kaj per *-n*).

**Fokuso** (F) Tiu frazparto, kiun la parolanto aŭ skribanto juĝas informvalora kaj tial emfazas. La fokuso estas komplementa al la fono.

**Fono** (G) Tiu frazparto, kiun la parolanto aŭ skribanto juĝas de neelstara aŭ fona valoro kaj tial ne emfazas. La fono estas komplementa al la fokuso.

**Frazfendo** Tiel nomiĝas tekniko, kiun oni povas uzi por enfokusigi iun frazparton. Ĝin ilustras la frazo *Estas tiu pomo, kiun mi volas*, per kiu oni povas emfazi, ke la dezirata objekto estas iu specifa pomo kaj ne alia pomo aŭ piro aŭ alia frukto.

**Informneŭtra** (Neutr) Neŭtra rilate la informvaloron, t.e. senemfaza kaj kvazaŭ eksterkunteksta.



**Komento (C)** Tio, kion oni diras pri la topiko.

**Modifanto** Ellasebla akcesoraĵo en vortgrupo, ekz. la adjektivo *bona* en la substantiva vortgrupo *bona vino*.

**Operatoro** Partikulo kun gramatika funkcio, ekz. *ne*.

**Plennoma** Esprimata per plena nomo aŭ substantivo (ekz. *libro*) anstataŭ per pronomo (*ĝi*).

**Pragmatiko** La studo de la aspektoj de la lingvouzo, t.e. de la intencoj kaj mesaĝoj, kiujn parolanto aŭ skribanto lingve transdonas al aŭskultanto aŭ leganto.

**Ŝablono** Modelo, ripetiĝanta konstruaĵo.

**Topiko (T)** Tio, pri kio estas farata aserto, ‘pri kio temas’. La topiko estas komplementa al la komento.

## Tekstnotoj

1 Detala lingvistika priskribo de FG estas Dik (1997). Tre bonan superrigardon donas <http://www.functionalgrammar.com>.

2 Tiuj ĉi termindifinoj kongruas kun PMEG (2006: 36, 39, 451).

3 Mi uzas la terminon ‘ŝablono’ kun la signifo, iom pli vasta ol la PIV-a, de modelo aŭ ripetiĝanta konstruaĵo. Por simpligi la lingvaĵon, mi uzas en tiu ĉi studo la terminon ‘vortordo’, eĉ kiam la translokeblaj unuoj en frazo estas pli ampleksaj ol unuopaj vortoj kaj kovras pli kompleksajn frazpartojn kiel vortgrupojn.

4 Vidu la *Principon de la Laŭpeza Vicigo* en Hawkins (1983: 90-93). La ĉi-tiea diskuto limiĝas al tiuj lingvoj, kiuj havas prepoziciojn, kiel Esperanto, kaj ne traktas lingvojn kun postpozicioj, ĉar tia vastigo de la diskuto neniel koncernus Esperanton. En mia studo mi rilatas la pezon de vort(grup)o al ties nombro da silaboj.

5 Vidu ekzemplojn en la franca lingvo en Comrie (1983: 83).

6 Vidu la fundamentan verkon de la strukturismo: De Saussure (1915/1971).

7 Por la sociaj atingoj de Esperanto vidu Blanke (2000).

8 Manders, tamen, ne vere difinis, kion li konsideris korekta.

9 La naciaj adaptoj de UL, kiujn mi konsideris, estas Einstein (1888), Marignoni (1890), Rodríguez Huertas (1890), Meier (1891), Trompeter (1891), De Beaufront (1893) kaj Jonsson (1893), ne eksplicite aldonitaj al la bibliografio, sed troveblaj en Jansen (2007: 229-245). Por kompleta listo de ĉiuj analizitaj lerniloj vidu Jansen (2007: 58-64).

10 Por la difino de ‘baza ordo’ vidu la ĉapitron 4.1.1.

11 Vidu la diskuton pri la ‘frazfendo’ en la ĉapitroj 4.1.1 kaj 4.2.

12 Vidu noton 4 pri la ‘pezo’ de frazparto.

13 Por kompleta priskribo de la korpuso vidu Jansen (2007: 254-255).

14 La reala difino de la ŝlosiloj estis pli fajna. Cetere, la aŭtomatigo de la serĉado estis necese kompletigita de detala permana pristudo de ĉiu trovaĵo en ĝia kunteksto.

- 15 Inter la 40 enketitoj la denaskaj lingvoj estis distruibitaj jene: 20 ĝermanaj, 17 latinidaj, 2 slavaj kaj 1 nehindeŭropa (finna).
- 16 Por detala priskribo de la enketo vidu Jansen (2007: 181-195).
- 17 Ekzemploj de tiaj lerniloj estas Van Bussum (1926), Cseh (1929/1992), Lem (1932), Van Straaten (1935), Driesen (1937) kaj Butler (1991), ne eksplicite aldonitaj al la bibliografio, sed troveblaj en Jansen (2007: 229-245).
- 18 Frazoj aŭ frazeroj, cititaj el la korpuso, koncize mencias la fonton *Esperanto* aŭ *Monato*. Ekzemplaj fraz(er)oj de la aŭtoro mem portas neniun fontindikon.
- 19 Ekzemploj de tiaj lerniloj estas Bakker (1931), Kalocsay (1931/1963), Seppik (1938), Schippers/1 (1971-72), Childs-Mee (1989), De Diego (1992), Malovec (2000) kaj Willkommen (2001), ne eksplicite aldonitaj al la bibliografio, sed troveblaj en Jansen (2007: 229-245).
- 20 ‘Libera variigeblo’ estas difinita ĉi tie kiel la senĝena lokŝanĝo de iu frazparto antaŭen aŭ malantaŭen, ŝajne sen ŝanĝo en la signifo aŭ la senco de la frazo.
- 21 Vidu Hawkins (1983).
- 22 Laŭ universalajoj jam retroveblaj ekz. en Blümel (1914) kaj en Tomlin (1986).
- 23 Laŭ la LR-Principo, la *Principo de la Deliva Dekstrena Frazorganizo*, frazpartoj inklinas lokiĝi de live dekstren laŭ vicordo de sia kreskanta noveco aŭ nekonateco al la aŭskultanto. Vidu por la konformeco inter la LR-Principo kaj la TC-sinsekvo ekz. Mallinson/Blake (1981) kaj Dik (1997).
- 24 Laŭ universalajoj jam retroveblaj ekz. en Weil (1879) kaj en Tomlin (1986).
- 25 Laŭ universalajo retrovebla ekz. en Tomlin (1986).
- 26 Laŭ universalajo jam trovebla en Behaghel (1928).
- 27 Temas pri strukturaj influoj indikitaj en Comrie (1983) kaj Hawkins (1983).
- 28 La plifirmeco de {O,V} kompare kun {S,V} estas trovebla en Tomlin (1986).
- 29 Temas konkrete pri la *Principo de Kunlaboro* de Grice (1975). Mi proponas ĉi tie, precipe por uzo en sciencaj tekstoj, la adjektivan radikon *rilev-* kun la signifo *aferkoncerna* (kp. angle *relevant*), precipe en tiuj okazoj, kiam oni bezonas pluformaĵon kiel *rileveco*, *nerileva*, k.s., evitante la neceson, elturniĝi per tre komplikaj derivaĵoj de *aferkoncern-*. En multaj okazoj en kuranta teksto, tamen, plene sufiĉas la uzo de *aferkoncerna* aŭ eĉ *koncerna*.



Naturaj vortordoj en Esperanto estas resumo de analizo de modernaj tekstoj kaj de eksperimentaj laboroj, kies temo estis la aŭtonomeco kaj natureco de vortordostrukturoj en nia lingvo. Surbaze de la teoria kadro de la t.n. Funkcia Gramatiko, ĝi provas ne nur priskribi, sed ankaŭ klarigi la observeblan ordigon de subjektoj, objektoj kaj adjektoj en frazo kaj tiun de adjektivoj en substantiva vortgrupo.

El la sama perspektivo ĝi esploras ankaŭ la sintaksajn aspektojn de la negacio en Esperanto. La fakto, ke la trajtoj de Esperanto, establitaj en tiu ĉi laboro, konformas al fasko da universalaj propraĵoj de la homa lingvo, subtenas la konstaton pri la natureco de nia lingvo.

Wim Jansen (1948) estas inĝeniero kaj magistro pri kompara lingvistiko kun specialiĝo pri la eŭska lingvo. Li doktoriĝis pri teoria lingvistiko per disertacio pri la vortordo en Esperanto. Nome de Internacia Esperanto-Instituto li okupas la specialan katedron pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.

ISBN 978-92-9017-103-4



9 789290 171034